

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Esperantaj
gastoj en
Lernejo de Paco**



**Riĉa eventaro
de Honkongo
ĝis Helsinko**



**Novaj Honoraj
Membroj:
Ducent jaroj
da Esperanto**



Informi: Kialoj kaj kieloj

Vi trovos

161 **Malferme**

44 jarojn post Frostavallen

Kalle Kniivilä

162 **GVIDLINIOJ POR INFORMADO PRI ESPERANTO**



164 **85-a Universala Kongreso**

Pri kunekzisto en oazo de paco

Amri Wandel

Memoreroj el Tel-Avivo

166 **Honoraj Membroj**

Honoritoj inter du kaj tridek lingvoj

168 **Lastatempe**

Ĉu vi pretas... por KEF 2000?

Christian Richard

Honkongo — la realiĝinta revo

Ulrich Matthias

170 La fruktoj de TEC

SAT: Ne kvanto, kvalito

Kongresanoj sur infan-fervojo

171 Navige tra TTT-paĝoj

172 **Instruado**

Kio NASKiĝas en Kalifornio?

ILEI: Amike, kvorume

173 Recenzoj

Sabira Ståhlberg pri
Korea antologio de
noveloj, La liberpoeto
kaj Birdoj senflugiloj

Rejna de Jong pri
De tajgo al minaretoj

Higinio García pri **Plutoso** kaj
Dialogoj de la dioj

Aleksander Korĵenkov pri
Gramatiko de Esperanto



175 Laste aperis

Kaj plue...

176 Fake - Oficiala informilo Influe

178 Persone - Lingve

179 Loke

180 Forpasoj

La kovrilo: Stando de
Itala Katolika Unuiĝo E-ista

Malferme: Albatroso en
Galapagoj (M. Vermaas)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establiĝinta kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.

Grafiko: Francisco L. Veuthey.

Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktotino: la 10-a de ĉiu monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 68,32;
USD 34; DEM 59; JPY 3900 ktp); informi-
ĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas € 3,00.

Anonctarifo (eŭroj): 1 p. 1000, 1/2 p.
550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera
kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja
ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-
konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.


Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la Centra Oficejo:

Pasquale Zapelli.



44 JAROJN POST FROSTAVALLÉN

En la Tel-Aviva kongreso mi estis kuranta el unu kunsido al alia, kiam mi en la vestiblo de la kongresejo ekvidis israelan televidan teamon. La teknikisto direktis sian enorman mikrofonon al Geraldo Mattos, kiu helpe de interpretisto rakontis por kio utilas tiu stranga lingvo. La demandoj estis la kutimaj, la respondoj majstroverkoj. La argumentoj de Geraldo Mattos estis nerefuteblaj, la lavango de faktoj estis nehaltigebla, sed pleje konvinkis la profunda sincereco kaj certeco de la intervjuato, certeco kiun povas doni nur profunda kono de la temo. Mi plukuris al mia kunsido jam sen ajnaj duboj pri la praveco de nia afero.

Pasis jam kvardek kvar jaroj post la akcepto de la Principaro de Frostavallen, sed la ĉefa konkludo de tiu baza dokumento pri informado neniel perdis sian aktualecon: por sukcesa informado necesas profundaj konoj kaj klara konscio pri la valoro de la fenomeno Esperanto. Nur per sufiĉaj scioj oni povas kuraĝe kaj konvinke argumenti kontraŭ eraraj prezentoj. Tial la unua tasko de informanto estas informi sin mem, kaj tiu lernado neniam ĉesas, ĉar neniam oni scias tro multe aŭ eĉ sufiĉe.

Informado estas laŭ sia naturo laboro kiu grandparte okazas sur loka kaj nacia niveloj, kaj tial la plej grandan parton de tiu laboro faras landaj asocioj kaj lokaj grupoj.

Tamen estas grave ke UEA laŭeble subtenu siajn landajn asociojn en tiu grava tasko. Unu ero en tiu subteno povus esti la “Gvidlinioj por informado pri Esperanto”, kiuj estis ellaboritaj sub instigo de la Komitata laborgrupo pri informado. La Komitato de UEA akceptis en la ĉi-jara Universala Kongreso malnetan version de la Gvidlinioj, kaj en ĉi tiu numero de nia revuo vi povas legi iom redaktitan version de tiu malneto, kiu ne hazarde komenciĝas per emfazo de la bezono konsciigi la publikon pri la ekzisto de lingva neegaleco kaj lingvaj problemoj en la mondo.

Se oni komparas la Gvidliniojn kun la Principaro de Frostavallen, oni rimarkas ke mankas ne nur la historia kaj organiza skizo, sed ankaŭ la listo de “ĉefaj eraroj” kaj instrukcioj pri insignoj kaj vestaĵoj. Ni kredas ke pozitiva instigo pli inspiras al sukcesa informado ol listo de malpermesoj. Ni kredas ankaŭ ke la Esperanto-movado ne plu estas movado de stranguloj kiujn oni devas admoni al deca konduto.

La publikigo de la Gvidlinioj neniel signifas ke la laboro estas finita. Ne temas pri fino, sed ja pri daŭrigo kaj pri ĉiama rekomenco: el unu sukceso en informado kutime rezultas bezono je plia informado. . . Ni esperas ke la Gvidlinioj efikos instige al ĉies pensado kaj agado.

Kalle Kniivilä



“La publiko malkovru la fundamentan ...

Gvidlinioj por informo

Informado devas esti fortika piliero por ke la Esperanta konstruaĵo kresku. Jen Komitata dokumento por helpi niajn masonistojn.

CELOJ

• Konsciigi la publikon pri la problemoj en la nuna internacia lingva ordo


Ĉia informado pri Esperanto estas senperspektiva, se la celgrupo ne konscias pri la ekzisto de lingva neegaleco kaj la nedemokratieco de la nuna internacia lingva ordo. La unua celo de la informado devas sekve esti ke la ĝenerala publiko malkovru la fundamentan nedemokratiecon de komunika sistemo, kiu tutvive privilegias iujn sed postulas de aliaj jarojn da penoj por atingi tamen malperfektan lingvoscion. En la strebado estigi diskuton pri lingva egaleco kaj lingvaj rajtoj troveblas multaj potencialaj aliancanoj kun similaj celoj. Ekzistas multaj sciencaj verkoj pri la efikoj de lingva neegaleco je tutmonda, loka kaj individua niveloj. Indas ke respondeculoj pri informado bone trastudu la temon. Por ŝanĝi la realaĵojn necesas unue ĝisfunde ekkoni ilin.

• Konsciigi la publikon pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto

Esperanto estas unika fenomeno, kaj antaŭ ĉio necesas ke la esperantistoj mem plene konsciu pri tio. Ĉiu esperantisto povas rakonti pri personaj spertoj kiuj ofte estas tute neimageblaj al eksteruloj. Konkretaj travivaĵoj kaj veraj homoj el foraj landoj estas la plej konvinka rimedo por atentigi la publikon pri la ekzisto de tiu fenomeno. Gravas ja ke la informado ne estu tro abstrakta: imponi povas personaj riĉiĝoj pere de Esperanto, emociaj kaj intelektaj. Informado pri Esperanto devas unuavice esti ĝuste informado, ne propagando. En informado ĉefan rolon havu veraj informoj, ne sloganoj. (“Lingvo de paco kaj amikeco”, “ĉies dua lingvo” ktp.) Ne ĉiu volas lerni Esperanton, sed multo estas atingita, se oni sukcesas konsciigi pli vastan publikon pri tio ke E-o estas vera vivanta lingvo kun parolkomunumo kiu ampleksas la tutan mondon, lingvokomunumo en kiu ĉiu ano povas senti sin plenrajta membro. Jam tio estas revelacio por la plej multaj homoj. Por efike informi pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto necesas ke la e-istoj mem pli profunde konu la fenomenon Esperanto, kaj sekve pli kuraĝe argumentu kontraŭ eraraj prezentoj.

• Proponi E-on kiel solvon en konkretaj situacioj

Nur post kiam la unuaj du celoj estas almenaŭ parte atingitaj, eblas serioze proponi uzon de Esperanto kiel solvon en iuj konkretaj situacioj. Necessas ĉiam konscii ke



Esperanto ne estas magia bastoneto, kiu per unu frapo povus forigi ĉiujn problemojn de lingva neegaleco. Antaŭ ol proponi Esperanton en konkreta situacio, necesas ĝisfunde pripensi kiun precizan rolon Esperanto povus havi, kiaj estus la avantaĝoj kaj malavantaĝoj, kaj kiaj estos la argumentoj de la kontraŭuloj. Sed en kazoj kie la avantaĝoj estas klaraj kaj la kontraŭargumentoj facile refuteblaj, oni kuraĝe faru sian proponon aŭ, se eble, simple ekuzu Esperanton.

• Kuraĝigi al lernado de Esperanto

Lerni Esperanton volos unuavice homoj kiuj konscias pri la problemoj en la nuntempa internacia lingva ordo aŭ sentas sin altirataj de la tutmonda egaleca lingvokomunumo de la E-parolantoj. Sekve la plej bona maniero varbi kursanojn estas konsciigi la publikon pri la ekzisto de lingva neegaleco kaj pri la ekzisto de tutmonda, egalece funkcia lingvokomunumo, en kiu ĉiuj bonvenas. Malmultaj deziros eklerni Esperanton nur pro tio ke ĝi estas relative facila lingvo. Ne la gramatikaj detaloj sed la fakto ke ĉiu povas igi Esperanton sia propra lingvo, igas ĝin unika kaj lerninda.

Stando pri Esperanto



Stando de Itala Katolika Unuiĝo E-ista en Renkontiĝo por la Amiĝo inter la Popoloj (aŭg. 1999, Rimini).

RIMEDOJ

Je la nivelo de UEA

Unuavicaĵaj celgrupoj

Landaj Asocioj de UEA; internacie agantaj, influ-kapablaj organizaĵoj kaj individuoj kiuj jam interesiĝas pri lingvaj rajtoj, organizaĵoj kaj medioj kie aktualiĝas demandoj pri egaleca komunikado; la informita ĝenerala publiko tutmonde, sed aparte en landoj kie ne ekzistas organizita Esperanto-movado.

Taskoj

Gvidado de la informa agado je landa nivelo; kontaktoj kun internaciaj organizaĵoj kaj laŭeble informado rekte al la monda publiko; ĝenerala informado en regionoj sen organizita movado.

Por subteni la informan agadon je landa nivelo, la Informa Fakto de UEA strebu regule disponigi al la landaj

asocioj gazetarajn komunikojn kaj pretajn modelajn artikolojn facile tradukeblajn kaj adapteblajn al lokaj cirkonstancoj. UEA ankaŭ strebu disponigi en siaj Interretaj paĝoj koncizajn respondojn al oftaj demandoj pri Esperanto kaj kolekton de modelaj informiloj diverslingvaj.

Ĉe internaciaj organizaĵoj UEA unuavice flegu la rilatojn, informu pri la esperantista agado kiu konformas kun la celoj de la koncernaj organizaĵoj kaj tiel montru la utilon de pluaj kaj pliaj kontaktoj por ambaŭ partioj. UEA ankaŭ laŭeble strebu konsciigi respondeculojn de la organizaĵoj pri la problemoj en la nuna internacia lingva ordo, sed tiuj strebadoj ne malutilu al la bonaj rilatoj kun la koncernaj organizaĵoj.

UEA aktive serĉu kontakton kun medioj kie oni diskutas problemojn rilatajn al lingva egaleco kaj tutmonda komunikado, kaj senpasie informu pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto.

Je la nivelo de landaj asocioj

Unuavicaĵaj celgrupoj

Lokaj grupoj kaj individuaj membroj de la Asocio; land-nivelo aŭ internacie agantaj, influ-kapablaj organizaĵoj kaj individuoj kiuj jam interesiĝas pri lingvaj rajtoj; naciaj aŭ lokaj organizaĵoj kaj medioj kie aktualiĝas demandoj pri egaleca komunikado; ĵurnalistoj de tutlandaj amaskomunikiloj kaj la ĝenerala informita publiko.

Taskoj

La ĉefa respondeco pri informa laboro kuŝas ĉe la nacia nivelo. La landa asocio provizu la lokajn grupojn kaj la individuajn membrojn per aktuala kaj profesie produktita inform-materialo, starigu rebat-servon kiu rapide reagu al eraraj prezentoj de E-o en tutlandaj kaj lokaj amaskomunikiloj, kaj ĝi aktive kontaktu organizaĵojn kaj individuojn kiuj povas interesiĝi pri egaleca tutmonda komunikado.

Je loka kaj individua nivelo

Unuavicaĵaj celgrupoj

Lokaj organizaĵoj kaj individuoj kiuj interesiĝas pri lingvaj problemoj, ĵurnalistoj de lokaj amaskomunikiloj kaj la ĝenerala publiko.

Taskoj

Informado pri konkretaj aranĝoj, kontaktoj kun lokaj ĵurnalistoj. La individuaj esperantistoj mem estu pli forte konvinkitaj pri la valoro de la fenomeno Esperanto, kaj ili havu sufiĉajn sciojn por kuraĝe kaj konvinke argumenti kontraŭ eraraj prezentoj. Pli gravas la kvalito ol la kvanto de la informado. ★

Pri kunekzisto en oazo de paco

Amri Wandel - Israelo

Tuj antaŭ la Tel-Aviva UK, la 25-an de julio, ĉ. 50 kongresanoj el 12 landoj partoprenis la tuttagan seminarion "Paco kaj kunekzisto" pri la araboj en Israelo kaj pri jud-araba kunekzisto.

Kvankam la lasta tago de la oficiala antaŭkongreso okazis en Israelo, ĝi estis kvazaŭ daŭrigo de la seminario "Tutmondigo kaj la arabaj landoj" en Amano (vidu sep., p. 146). Ĉi ties partoprenantoj kuniĝis kun kongresanoj alveturintaj el Tel Avivo en la jud-araba miksita vilaĝo Neve Shalom/Wahat al-Salam ("Pac-oazo", vidu marto, p. 42).

La prelegoj okazis en la hebrea, kun E-interpretado, en belpejzaĝa salono kun la simbola nomo "La Blanka Kolombo", kadre de la "Lernejo de Paco" — internacie renoma institucio kiu esploras pri la jud-araba konflikto kaj edukas pri paca solvo de konfliktoj. (Pliaj informoj ĉe <http://nswas.com>, kie eblas legi ankaŭ pri nia seminario.)

Bonvenigis la programdirektorino Sigalit Giv'on, kaj Amri Wandel, iniciatinto de la seminario, kiu emfazis ke ĉi tiu aranĝo montras la deziron de UEA atenti ankaŭ la alian popolon de la kongreslando, la araban malplimulton. D-ro Adel Manaa, direktoro de la esplorcentro pri la araba socio en la prestiĝa instituto Van Leer, prezentis la demografian historion kaj disdividon



La vortojn de Wafa Seror (dekstre) interpretas Jeremi Gishron.

de la palestina popolo inter Israelo, la palestina aŭtonomio kaj la najbaraj arabaj landoj. Amri Wandel prelegis pri "La du lingvoj de Abrahamo: lingvaj aspektoj de kunekzisto de judoj kaj araboj en Israelo" (prelego ripetota en la UK). Temis pri la multoblaj tavoloj de la araba identeco en Israelo: la nacia-palestina, la ŝtata-civitana, la tradicia-kultura, la lingva kaj la religia. Li klarigis la rolon kaj interrilaton de la du lingvoj, hebrea kaj araba, en la edukado, kariero kaj kulturo. Konkreta ekzemplo de tiu aspekto estis la sekva prezentaĵo de Wafa Seror de Pac-oazo, kiu parolis pri la vilaĝo kaj pri la defioj kaj problemoj de ĉiutaga vivo kaj kunlaboro en miksita socio.

La sekva programparto, diskuto en kvar grupoj, emociis ne nur la gastojn, sed ankaŭ la gvidantojn. Normale grupaj diskutoj fluas en unu lingvo, dum ĉi-foje la gvidantoj devis adaptiĝi al interpretado, sed tio neniel malhelpis liberan esprimon de ĉies pensoj kaj demandoj kaj rakontadon de spertoj pri konfliktoj kaj solvoj en aliaj landoj aŭ regionoj. Laŭ la programdirektorino, la grup-gvidantojn tre impresis la partoprenantoj pro siaj konscio kaj kompreno de la konflikta dinamiko. Ŝi aldonis ke la Esperanto-grupo estis tre interesa por la stabanoj, pro sia internacieco kaj pro la lingva solvo — temoj kiuj multe okupas ilin en la propra medio. Ŝi tamen ne kredas ke Esperanto havos praktikan rolon en la kontakto inter judoj kaj araboj.

Lingva malegaleco

Post la tagmanĝa paŭzo la direktoro de la Lernejo, Rabah Ĥalabi, prelegis pri "Lingvo kiel ponto aŭ obstaklo: la hebrea kaj la araba en la rilato inter majoritato kaj minoritato". Li pritraktis la mankon de egaleco inter la hebrea kaj la araba lingvoj en tri sferoj: Israelo, Pac-oazo kaj la Lernejo de Paco, en kiu judoj kaj araboj ja deziras kunlabori en sfero de lingva egaleco, sed en la efektiveco la laborlingvo plej ofte estas la hebrea, ĉar araboj bone konas la hebrean, dum judoj malpli bone aŭ apenaŭ konas la araban lingvon.

Taŭge fermis la seminarion la kundedirektorino Nava Sonnenschein, kiu prelegis pri "Modeloj de konflikto-solvado", prezentante la metodojn kaj procedurojn de la Lernejo.

Survoje al la kongresurbo Tel Avivo-Jafo — alia ekzemplo de jud-araba kunekzisto — la partoprenintoj povis mense rerigardi al jam pli kompleta bildo de la konflikto kaj de la kunekzisto inter la du popoloj de Israelo — bildo detale desegnita en tiu oazo de paco.

El Popola Ĉinio: Venontjare nur en TTT

El Popola Ĉinio, ĵus festinta sian 50-jariĝon (vidu jun., p. 118), anoncis en sia oktobra numero ke ĝi ne plu eldoniĝos kiel papera revuo, sed daŭrigos sian aperadon en TTT, ĉe <http://www.china.org.cn>. La ĉefaj kialoj de tia decido estas "manko de monrimedoj kaj konstanta malpliigo de la abonantoj" en la lastaj jaroj. La redakcio (EPC, P. O. Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio; epc@china-report.com) sentas grandan bedaŭron, sed kore dankas pro la subteno de siaj legantoj kaj kredas ke "la reta EPC fariĝos nova fenestro enrigardi en Ĉinion".

Memoreroj el Tel-Avivo

Dum la redakto de ĉi tiuj paĝoj, pli agrablis rememori la optimismajn tagojn de nia UK ol legi malgajajn aktualaĵojn el nia kongreslando.

Akademio: Prezento kaj elekto

Naŭ anoj de la Akademio de Esperanto, i.a. prezidanto Geraldo Mattos kaj vicprezidanto Christer Kiselman, prezentis sin al ĉ. 100-kapa publiko dum la UK. La akademianoj parolis i.a. pri internacia simpozio pri lingva planado kaj leksikologio (Zagreb, 28-30 julio 2001), pri la revuo *Esperantologio/Esperanto Studies* (dua kajero en preparo) kaj pri la komisiono por kunlaboro inter la Akademio kaj aliaj lingvaj institucioj, speciale ILEI. La demandoj el la publiko temis pri la "landnoma kaoso" (Daniel Pfeiffer) — kiu laŭ respondinto Humphrey Tonkin "spegulas la kaoson de la mondo" —, pri la manko de juraj terminoj en E-o ktp. Oni eksciis ke la lingva konsultejo de la Akademio (vidu feb. '99, p. 27), gvidata de Stefan Maul (maul@newsfactory.net), ricevas lastatempe

nur malmultajn demandojn. Laŭ rakonto de Boris Kolker, kongresano postulis ke la Akademio malpermesu ĉiujn superflujajn vortojn...

Estis petitaj proponoj pri novaj membroj, ĉar triono de la Akademio (17 membroj) estas elektota ĉi-jare, el inter tiuj membroj kies mandato finiĝas nun, kaj el la novaj kandidatoj. Por fariĝi kandidato, esperantisto devas esti proponata de almenaŭ kvin akademianoj kun almenaŭ tri malsamaj naciaj lingvoj. La proponoj kaj ĉiuj necesaj informoj kaj deklaroj devas atingi plej laste la 30-an de novembro 2000 la prezidanton (Geraldo Mattos, Rua Dr. João Motter, 98 BR-81210-260 Curitiba PR, Brazilo; mattos@super.com.br) aŭ la sekretario (Renato Corsetti, adreso en la kolofono) de la Akademio.

Laŭ komunikoj de Christer Kiselman



D-rino Eva Bojaĝieva

IKU: De Genezo ĝis Ŝekspiro

Akorde kun la temriĉa kongresprogramo, la 53-a sesio de Internacia Kongresa Universitato proponis varian temaron. Kiel kutime de 1995, okazis sesio komuna kun kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj, proponanta la kursarojn "Ŝekspiro tutmonda", de prof. Humphrey Tonkin, kiu verve prezentis la Ŝekspiran verkaron pere de E-tradukoj, kaj "Flavius Josephus", de d-rino Věra Barandovská-Frank, kiu konatigis la aŭskultantojn kun plej fama historiisto, dokumentinta la dramajn okazaĵojn en la kongreslando antaŭ 2000 jaroj. Krome okazis kvin IKU-prelegoj: d-rino Eva Bojaĝieva instruis pri la citokinoj de la homa imunsistemo, kaj d-ro Vilmos Benczik prelegis pri la kvar komunikadaj revolucioj kaj la homa lingvo. Prof. Amri Wandel, IKU-rektoro, ligis sian prelegon al la Biblio, komparante la historion de Genezo kun la modernaj teorioj pri kosmologio kaj pri evoluo de vivo sur la Tero. D-ro Hans Eichhorn klarigis kial la moderna psikiatrio estas venena kaj pri alternativo al ĝi. D-ro Ulrich Lins fermis la serion prelegante pri la juda E-verkisto Israel Lejzerowicz.

Amri Wandel

Ĉapelo urbestra

Atingis nin foto kontribuanta al la debato pri la utilo de ĉapeloj: en la akcepto ĉe la urbestro Ron Ĥuldai (meze), Amri Wandel dankis la urbestrejon pro la multspeca helpo ricevita por nia kongreso kaj donacis ĉapelon al urbestro Ĥuldai.



Aŭkcio: Pirotekniko televide

Virtuoza makleristo, Humphrey Tonkin kreis aŭkcian spektaklon tiom piroteknikecan ke en la superplena salono ĝuis ĝin ankaŭ la neaĉetema plimulto. La aranĝo evidente surprizis teamon de la Israela Televido, kiu pasigis tie pli da tempo ol ĝi antaŭvidis.

La vendo de 59 objektoj kontribuis per 4035 sikloj (€ 1105) al Fondaĵo Afriko de UEA. Plej multaj aŭkciaĵoj estis libroj, sed plej alte prezigiis la kongresnumero 1 por Zagreb (€ 84, plus aliĝkoto) kaj ĉi-jara UK-afiŝo aŭtografita de LKK-anoj (€ 68).

La aŭkcia sekretariino Michela Lipari

enkasigis la plej altan libroprezon por la unua kaj sola volumo de *Ilustrita vortaro de Esperanto: A-K* (Francisco Azorín, 1955): € 51. Bindita jarkolekto de *Esperanto* el 1954 atingis € 46. La plej malnova aŭkciaĵo, *Literatura Aldono al Lingvo Internacia* el 1905, kostis € 30.

Honoritoj inter du kaj tridek lingvoj

En sia Tel-Aviva kunsido la Komitato de UEA distingas kvar aktivajn esperantistojn per honora membreco de la Asocio.

Juan Eduardo BACHRICH (1921, 1938*), Venezuelo. Emerita plantkulturisto. Li lernis Esperanton en Jugoslavio, post konatiĝo kun Ivo Lapenna (1937). Kiel studento en Budapeŝto ekde 1940, li kunlaboris (mallonge pro la milito) kun tieaj esperantistoj. Elmigrante al Venezuelo en 1948, li baldaŭ ekorganizis tie kursojn de Esperanto kaj publikajn prelegojn, aperigante artikolojn. Dediĉante sin al la reorganizado de la venezuela movado, en 1975 — kun Octavio de Diego kaj Félix García Blázquez — li leĝe registris Venezuelan Esperanto-Asocion, fonditan jam en 1912. Ekde tiam li estas la ĝenerala sekretario de VEA, kiun li reprezentis en 4 kontinentoj, i.a. en 17 UK-oj, kaj ankaŭ kiel obser-

Juan Eduardo Bachrich



Elvira Fontes



Sija van Wijngaarden



Edwin de Kock



Esperanto — pasporto al la tuta mondo.

Edwin DE KOCK (1930, 1955), Sud-Afriko/Usono. Emerita altlerneja instruisto, laika predikanto adventista. Li lernis tridek lingvojn, inter kiuj Esperanton specife por verke esplori

VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 25-an de novembro 2000 (10h00 - 17h00)



- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Bazono de e-aĵoj

Speciala gasto:
SPOMENKA
ŠTIMEC



- ★ Senpaga loterio
- ★ Senhala prezento de E-filmoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

vanto en la Komitato de UEA (1978-82, 1998-). Membro de UEA ekde 1937, li aktivas kiel delegito kaj fakdelegito pri plantkulturado ekde 1952 kaj kiel esperanto de 1974. Li estis komitatano C (1992-98). En 1992 li lanĉis la ideon pri amasa Esperanto-instruado per televido kaj kontribuis al la realigo de la projektoj *Mazi en Gondolando* kaj


ĝiajn beletrajn eblojn. Liaj poemoj, artikoloj kaj libroj aperis en la afrikansa, angla kaj ĉefe Esperanto. Post debuto en *Esperanta antologio* (1958) li aperigis ok librojn: *Ombroj de la kvara dimensio* (1961), *Fajro sur mia lango* (1967), *Poemaro kaj prozerroj* (1970), *Kvin elementoj* (1970), *Plukonstrue* (1975), *Japaneskoj* (1982), *Saluton al la suno* (1983) kaj *Vojaĝoj* (1992), krom partoj de la epopeo *Konflikto de la Epokoj* (1984, 1985). Li estas elstara literatur-kritikisto Esperanta. Membro de UEA de 1956, akademiano de 1973, li prezidis Sudafrikan E-Asocion de 1977 ĝis 1990, i.a. realigante statutŝanĝon por deklari eksplicite la rajton membriĝi en la

KIO ESTU NIA LINGVOPOLITIKO?

POR AKTIVA LINGVOPOLITIKO. Aktoj de la lingvopolitika seminario en la 81-a UK de Esperanto, Prago 1996. Red. D. Blanke, R. McCoy kaj O. Buller. Rotterdam: UEA 1999. 71p. Prezo: € 7,10.

Ĉu ni bezonas lingvopolitikon? Kio estas lingvopolitiko? Ĉu nur UEA devus havi ĝin aŭ la tuta Esperanto-komunumo? Kiel lerni el la sperto de naciaj lingvoj? Kontribuajoj de H. Tonkin, W. Bormann, Yamasaki S., A. Wandel, R. Corsetti kaj D. Blanke.

POR
AKTIVA
LINGVOPOLITIKO



Asocio sen diskriminacio pro raso, religio ktp. Li gvidis la unuan landan kongreson en 1987 kaj redaktis la landan revuon *Bona Espero*. Ekde 1994 li vivas en Usono.

Elvira FONTES (1916, 1960), Brazilo. Instruistino de la franca. Ekde 1961 ŝi daŭre instruas E-on, plejparte ĉe E-Asocio de San-Paŭlo (EASP), kiun ŝi prezidis (1974-83) kaj kies bultenon *La Lampiro* ŝi longtempe redaktis. Dum multaj jaroj ŝi respondecis pri la organizado de ekzamenoj de Brazila E-Ligo dum la landaj E-kongresoj. Ŝi estas direktoro de la Departemento pri Instruado de EASP kaj sekiestros de ILEI en Brazilo. De 1973 ĝis 1988 ŝi havis konstantan rubrikon pri Esperanto en la ĵurnalo *Diário Popular* de San-Paŭlo. Oni ofte invitas ŝin paroli pri E-o ĉe ĵurnaloj kaj televidstacioj. Aperis du ŝiaj verkoj: *Unuaj paŝoj* (1996, 6-a eldono) kaj *Survoje al Esperantujo* (1991). Ŝi pretigas dudirektan portugalan-Esperantan vortaron. Membro de UEA ekde 1970, fakdelegito pri literaturo ekde 1973 kaj komitatano A (1974-80).

Sija VAN WIJNGAARDEN (1920, 1948), Nederlando. Oficistino. Ŝi lernis Esperanton aŭdinte pri ĝi en kunsidoj de la soci-reformisma Bellamy-movado kaj unuafoje uzis ĝin en 1950, partoprenante en aŭstra E-kongreso en Vieno laŭ invito de korespondamiko. Ekde 1954 (Haarlem) ŝi partoprenis entute 37 UK-ojn. Parolante krom la nederlanda nur Esperanton, ŝi povis ekkoni la tutan mondon per siaj E-kontaktoj korespondaj kaj vojaĝaj. Fervora fotoamatoro, ŝi amasigis grandan kolekton de diapozitivoj pri UK-oj kaj siaj aliaj vojaĝoj. Membriginte en Nederlanda Laborista E-Asocio en 1948, ŝi aliĝis al UEA en 1957, kaj en la sama jaro la tiama direktorino de la Centra Oficejo, f-ino Vermaas, invitis ŝin fariĝi oficistino de UEA, kiun postenon ŝi plenumis 28 jarojn ĝis sia emeritiĝo en 1985, zorgante ĉefe pri membroadministrado kaj adreso. Dumviva membro de UEA ŝi estas ekde 1963 kaj de 1987 fidela membro de Societo Zamenhof. ★

* La dua jarcifero indikas ĉie la daton de esperantistiĝo.

KOTIZTABELO DE UEA POR 2001

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Argentino/eŭro	4	10	24	14	9	48
Aŭstralio/dolaro	14	34	85	51	31	170
Aŭstrio/eŭro	7,63	19,26	47,96	30,52	18,17	95,93
Aŭstrio/ŝilingo	105	265	660	420	250	1320
Belgio/eŭro	7,68	19,21	48,09	30,61	18,34	96,18
Belgio/franko	310	775	1940	1235	740	3880
Brazilo/eŭro	4	10	24	14	9	48
Britio/pundo	5	14	34	21	13	68
Bulgario/eŭro	4	10	24	14	9	48
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	630	380	2100
Danio/krono	55	140	355	230	135	710
Finnlando/eŭro	7,57	19,34	47,93	30,27	18,50	95,87
Finnlando/marko	45	115	285	180	110	570
Francio/eŭro	7,62	19,06	48,02	30,49	18,29	96,04
Francio/franko	50	125	315	200	120	630
Germanio/eŭro	7,67	19,43	48,06	30,17	18,41	96,12
Germanio/marko	15	38	94	59	36	188
Greklando/drakmo	2200	5400	13500	8600	5200	27000
Hispanio/eŭro	7,21	18,03	44,47	28,25	16,83	88,94
Hispanio/peseto	1200	3000	7400	4700	2800	14800
Hungario/forinto	1200	3100	7700	4600	2800	15400
Irlando/eŭro	7,62	19,05	47,93	30,47	17,78	95,86
Irlando/pundo	6	15	37,75	24	14	75,50
Islando/eŭro	8	19	48	29	17	96
Israelo/eŭro	6	16	39	23	14	78
Italio/eŭro	7,75	19,11	48,03	30,47	18,59	96,06
Italio/liro	15000	37000	93000	59000	36000	186000
Japanio/eno	900	2200	5500	3300	2000	11000
Kanado/dolaro	12	30	75	45	27	150
Nederlando/eŭro	8	19	48	31	18	96
Nederlando/guldeno	17,63	41,87	105,78	68,32	39,67	211,56
Norvegio/krono	65	165	415	250	150	830
Nov-Zelando/dolaro	16	40	100	60	36	200
Pollando/eŭro	4	10	24	14	9	48
Portugalio/eŭro	6,98	16,96	42,40	26,94	15,96	84,80
Portugalio/eskudo	1400	3400	8500	5400	3200	17000
Rusio/eŭro	4	10	24	14	9	48
Slovakio/krono	190	480	1200	720	430	2400
Svedio/krono	70	170	430	275	165	860
Svislando/franko	12	31	78	47	28	156
Usono/dolaro	8	20	50	30	18	100
TARIFO A/eŭro	5	13	32	19	11	64
TARIFO B/eŭro	4	10	24	14	9	48

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio, San-Marino laŭ Italio, Liĥtenŝtejno laŭ Svislando.

TARIFO A: Honkongo, Korea Resp., Malto, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM: Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)


PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

Ĉu vi pretas... por KEF 2000?

Christian Richard - Kanado



Originala Esperanto-kulturo floris, de iberaj verkistoj ĝis Dolcxamar, en la 7-a Kultura E-Festivalo (KEF; Helsinko, 17-23 julio).



Satari Kuorppinen

estroj Flo Martorell kaj DĴ Kunar. Ornamis la murojn vasta ekspozicio de E-bildstrioj: verkoj de Arnau Torras, Niko Vološin kaj Martin Weichert.

Plej ĝuigis eble ne la spektakloj kaj sinprezentoj de tiuj talentuloj, sed ĝuste la ebleco ekkoni ilin persone. Vesperman-

ĝante modestan supaĵon, eblis sencere monie interŝanĝi ideojn kaj ŝercojn kun fama ibera verkisto, aŭ sidi en la finna naturo ĉe komforta fajro por pribabili la lastan libron de ŝatata aŭtorino kun ŝi.

Fortege impresis la nova furorbanda Dolcxamar, kies resonoj aŭdeblis en ĉies postkoncerta zumado: "Ĉu vi pretas... Ĉu vi pretas...?" Unu koncerto okazis publike en urbocentra parko kaj allogis multajn preterpasantajn helsinkanojn. Por dancigi hodiaŭajn genera-

Ĉi-somere okazis unu el la plej gravaj eventoj en la historio de la originala E-kulturo. Al la internacia kulturcentro Caisa, urbomeze de Helsinko, venis preskaŭ 200 personoj por sperti KEF 2000. Tiu festivalo laŭ kutimo okazas en nordeŭropa lando, kaj ĉi 7-a KEF, por la unua fojo, en Finnlando. Ĝojigis ĉiujn partoprenantojn vere ĝisranda pakita programo: literature, muzike, spektakle, teatre, bildstrie kaj lude. Notinde: ĉiuj programeroj estis originale en Esperanto.

Jen malofta viciĝo de astroj! En sama aranĝo ĉeestis ĉiuj kvar verkistoj de la t.n. ibera skolo. Miguel Fernández sorĉis ĉiujn per belega kantvoĉo. Jorge Camacho analizis roklikrikon kaj debatis kontraŭ kunakademiano Jouko Lindstedt pri neologismaj vortoj. Ankaŭ la suka literaturo de Liven Dek kaj Gonçalo



En KEF la Esperanta kulturo konkeris ankaŭ publikan spacon.



Neves prezentiĝis antaŭ la publiko. Aliaj verkistoj tie estis Sabira Ståhlberg, Ljubomir Trifončovski kaj Anja Karkainen. Sursceneje Kim Henriksen distris ĉiujn per sia populara dancospektaklo kaj kantante en la muzikgrupo Esperanto Desperado. Ege kortuŝis la solkoncerto de Juhani Haavisto. Koncertis ankaŭ klasikaj steluloj kiel Persone aŭ Ĵomart kaj Nataŝa. Eksperimentan afiksoludon kaj teaman fantazi-rolludon gvidis Jukka Vajjärvi resp. Christian Richard.

Multaj spektis la originale Esperantan kaj lastatempe refamiĝantan hororaĵon *Incubus* (1960): filmo tiel malbona ke ĝi estas vidinda! Ĉiunokte eblis danci dank' al la deĵorantaj disk-

ciojn, Dolcxamar provizas ilin per buntstila muzikumado, de dura elektroniko ĝis ritma hiphopo, kun daŭre frenezigita publiko!

Ĝuste ĉi tia renkontiĝo, kia miksis la energion kaj talenton de junuloj kaj malplijunuloj, maloftas en Esperantio. Magie inspiritaj de la etoso, multaj senspertuloj subite ekverkis kaj deklamis siajn versojn.

Elstare bone raportis pri la tuta festivalo la finnaj amaskomunikiloj, kiuj daŭre aperigis artikolojn kaj intervjuojn. Ekde la UK en Tampere (1995) neniu E-aranĝo en Finnlando kaptis same vastan kaj pozitivan atenton.

Talentaj E-artistoj ja spiras kaj kreas. Ni fieru pri la sukcesega KEF 2000! ★

Gvide de Jouko Lindstedt oni seminariis "20 jarojn post Raŭmo". Vidu ĉe <http://www.esperanto.fi/kef2000.html> tekstojn de D. Blanke, M. Fettes, J. Lindstedt, W. Ŵelazny.

Honkongo – la realiĝinta revo

Ulrich Matthias - Germanio

Por multaj el la ĉ. 200 partoprenantoj, la 56-a Internacia Junulara Kongreso (5-12 aŭg., Honkongo) malfermis novan, nekonatan mondon.

Kiam Honkongo invitis al la ĉi-jara IJK, en Eŭropo ne tre multaj junaj esperantistoj ĝojis. Multaj timis pagi milon da eŭroj por fine damaĝi la medion per interkontinenta flugo, suferi de varmego vetero kaj eventuale trovi nur malaltan lingvan nivelon ĉe niaj aziaj samideanoj.

Ankaŭ mi komence hezitis, sed priensis ke mi tre ŝatus iam vojaĝi al alia kontinento por konatiĝi kun aliaj homoj kaj kulturoj. Kaj kiel tio povus esti pli bela ol en la etoso inter junaj esperantistoj? Miaj antaŭgojoj kaj sci-volo kreskis precipe kiam en junio la Honkonga LKK aperigis en siaj bele prizorgitaj retpaĝoj (<http://esperanto.org/ijk2000>) la liston de la unuaj 160 aliĝintoj. Kiom da nekonataj, ekzotaj nomoj...

Elirante en Honkongo el la flughaveno, mi sentis klimaton kiun mi ĝis nun konis nur el tropikaj domoj de botanikaj ĝardenoj — tamen facile elteneblan. Pli gravis la unuaj impresoj en la kongresejo: rapide mi konvinkigis ke ankaŭ inter la aziaj IJK-anoj troviĝas sufiĉe da homoj kun kiuj eblas bone, parte eĉ tre bone, interparoli Esperante.

Nia ejo — feria vilaĝo meze de naturo — ideale taŭgis por gastigi IJK. Ni trovis tie klimatizitajn kunvenejojn kaj dormĉambrojn, kaj multajn eblojn por sporti. Danke al naĝejo, al la vento kaj la humideco, la vetero restis agrabla ankaŭ post la dua tago, kiam la temperaturo altiĝis al eble 35 gradoj.

"Dankon pro via herbo"

Meze de nia ejo troviĝis herbejo kun tegmentetoj kaj benkoj, kie tage kaj nokte eblis renkonti aliajn homojn, babili, kanti, ludi ktp. La kompreniĝo funkciis pli bone ol mi atendis. Inter la ĉ. 200 kongresanoj el 24 landoj de ĉiuj kontinentoj troviĝis 160 azianoj el Ĉinio, Honkongo, Tajvano, Japa-



En la 56-a IJK nur ĉiu kvina partoprenanto venis el ekster Azio.

nio, Koreio, Vjetnamio, Nepalo, Mongolio kaj Siberio, sed nur 30 eŭropanoj. Foje mi aŭdis dirojn kiel "Dankon pro via herbo" aŭ "Unu rando — du sistemoj", kiujn sperta eŭropa e-isto tamen tuj komprenas ("herbo" = helpo, "rando" = lando). Sed mi ne rajtas moki pri tio — juna koreo atentigis min pri mia germaneca "r" ("bildkato" = bildkarto, "ondo" = rondo). Eĉ la tre simpla interkona ludo sidi en cirklo kaj ripeti la nomojn de la aliaj, fariĝis tre amuza en ĉi tia, vere interkultura IJK.

Tiu ĉi IJK meritas multe da laŭdo. Ŝajnas ke la organizado funkciis tute glate; la programo estis sufiĉe abunda kaj interesa, kaj eĉ la tuttaga ekskurso al la centro de Honkongo valoris sian pli ol 50-eŭran kotizon.

Elspezoj kaj entuziasmo

Por preskaŭ ĉiu IJK-ano la partopreno postulis grandajn elspezojn. Multaj ĉinoj devis pagi krom la IJK-kotizo

ankaŭ restadon en hotelo, kiun ili fakte tute ne vizitis, nur por akiri enirpermeson al Honkongo. "Estas facile por ni iri al Rusio, sed malfacile iri al Honkongo" — klarigis al mi juna ĉinino. Sed verŝajne pro tiuj ĉi altaj kostoj partoprenis en la IJK ĉefe homoj kiuj tre ŝatas Esperanton. Videblis

multe da entuziasmo — kaj multaj verdaj flagoj. Specialan simpaton akiris la vjetnama delegacio, 9 gejunuloj el Hanojo, kiuj emfazis en sia kunveno "Hanojo — via rendevuo" ke post jarcento kun 30 jaroj da milito ili deziras igi sian urbon centro de paco. Ili tre ŝatus post kelkaj jaroj — ankorau bezonataj por lingva spertiĝo — inviti al UK aŭ IJK en sia lando. Ankaŭ juna niĝeriano videble ĝojis ke post multaj vanaj provoj akiri vizon por partopreni en eŭropa IJK aŭ UK (kaj post pago de pli ol 2000 usonaj dolaroj por flugbileto) finfine realiĝis lia revo esti kune kun esperantistoj el la tuta mondo.

Tiu ĉi IJK estigis multe da novaj amikecoj kaj vastigis ĉies horizontojn. Kiam antaŭ 14 jaroj mi eklernis Esperanton, malfermiĝis al mi nova, nekonata mondo. Kaj post mia partopreno en la Honkonga IJK tiu ĉi mondo ŝajnas al mi multe pli granda ol antaŭe. ★

La fruktoj de TEC

Du junaj geesperantistoj dediĉis someran semajnon en Vieno al temoj terminologiaj.

Delongaj kontaktoj de Terminologia Esperanto-Centro de UEA (TEC) kun la internaciaj terminologiaj instancoj Infoterm kaj TermNet ebligis la partoprenon de du junaj geesperantistoj en la Terminologia Somera Akademio en Vieno, de 7 ĝis 12 aŭgusto.



Sandra Schweder kaj Fabien van Mook

Fabien van Mook, kiu jam plurajn jarojn aktivas en la terminologia komisiono de Tutmonda Asocio de Konstruistoj E-istaj, kaj Sandra Schweder, kiu diplomiĝis per studfina verko pri terminologio en Esperanto (vidu sep. '99, p. 149), ĉeestis la kursaron kun entute 35 partoprenantoj el 20 landoj. La partoprenon de la duopo subtenis Fondaĵo Wüster de UEA.

La unusemajna aranĝo konsistis el kvin partoj:

- bazaj principoj de terminologio;
- terminologia mastrumado per komputiloj;
- trejnado kaj instruado pri terminologio;
- apliko de terminologio en tradukado kaj adaptado de komputilaj programoj kaj dokumentoj;
- ontologio.

Van Mook substrekiĝis ke "tre utilis la kurso por vidi novajn alpaŝojn kaj metodojn de la nuntempa terminologio kaj ties aplikoj en la mondo". Ankaŭ ekestis valoraj neformalaj kontaktoj, kaj Schweder estis invitita viziti ankoraŭ ĉi-jare la nun renovigatan Wüster-arkivon de Infoterm.

SAT: Ne kvanto, kvalito

Post longa tempo unuan fojon Sennacieca Asocio Tutmonda povis kongresi (15-23 julio) en Ruslando, sed malmultaj venis.

Kvankam la cirkonstancoj malebligis fortan partoprenon en la 73-a SAT-kongreso en Moskvo, la laboro de la ĉ. 70 aliĝintoj estis efika. Oni pritraktis temojn kiel homaj rajtoj en post-sovetiaj landoj, kunekzistado de diversaj etnoj en Dagestano, sindikata movado en Ruslando kaj speciale en la aŭtomobila industrio, nova maldekstro ruslanda, anarkiista movado en Ruslando ktp. Streboj pri reorganizado de la strukturoj de SAT konkretiĝis en ĝia ĝenerala konsilantaro kaj en pri-



Tibor Szabadi kaj István Tüttő en la Ruĝa Placo

Kongresanoj sur infan-fervojo

La 52-a kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio (13-19 majo, Budapeŝto) allogis partoprenantojn el rekorda nombro da landoj.

Neniam pli frue kunvenis e-istaj fervojistoj el tiom da landoj (25) kiel nun en Budapeŝto. 277 aliĝintoj povis ĝui riĉan programon, kiu komenciĝis per ekumena diservo.

La inaŭguron ĉeestis i.a. Gábor Bajnai, vic-ĝenerala direktoro de la Hungaraj Ŝtatafervojoj (MÁV), Gilbert Schmit, la prezidanto de Fervojista Kultura kaj Libertempa Organizaĵo (FISAIC), kaj UEA-estrarano Petr Chrdle. Estis transdonitaj diplomoj



al du novaj Honoraj Membroj de IFEF: Jaroslav David (Ĉeĥio) kaj János Patay (Hungario).

La sekretario de la Terminara Sekcio, d-ro Heinz Hoffmann, raportis

ke IFEF amplekse liveris la tradukojn por la 3-a eldono de la multlingva datumbanko *RailLexic* de Internacia Fervoja Unio, aperonta libroforme, kompaktdiske kaj en Interreto.

Kiel nova gvidanto de la Faka Komisiono elektigis Jan Niemann (Danio); kiel sekretarioj de la Fake Aplika Sekcio, Ladislav Kovář (Ĉeĥio) kaj d-ro Heinz Hoffmann (Germanio).

RET-INFO

Retpoŝta Esperanto-novaĵservo

<http://www.esperanto.hu> ret-info@esperanto.org

zorgado de ĝia TTT-ejo (<http://multimania.com/satesperanto>).

La kongreso kondamnis en sia deklaro ĉian militon, i.a. en Ĉeĉenio, kaj pledis por alternativa paca solvo ĉiam trovebla. Ĝi same kondamnis “iun ajn terorismon, ĉu individuan ĉu ŝtatan, ĉie en la mondo”. La kongreso krome alvokis registarojn “respondi taŭge al la civitanaj movadoj por enkonduki en la realan, tamen nepran tutmondiĝon pli kaj pli da demokratio”. Ĝi esprimis ankaŭ subtenon al ĉiuj pacbatalantoj en la mondo kaj al la movadoj kaj manifestacioj kontraŭ streboj al transformo de ĉio — eĉ de la vivo mem — al varo.

La gvidrezolucio i.a. alvokas SAT-anojn subskribi “Manifeston 2000” por kulturo de paco kaj senperforto.

Al la kongreso speciale venis la urbestro de Nagykanizsa (Hungario), István Tüttő, kiu invitis Esperantlingve por la 74-a SAT-kongreso (14-21 julio 2001) en sia urbo, proksima al la UK-okazejo Zagrebo.

Laŭ raporto de Henri Masson (el NUN)

La temo de la kongresa fakprelego forte malsamis de la tradiciaj temoj rilataj al evoluigo kaj modernigo: d-ro József Halász opiniis la fervojajn planojn en Hungario tro dubaj, kaj tial li preferis trakti la problemon de trankvileco trapasejoj. La riĉa reagaro konfirmis la ĝustecon de lia tem-elekto.

Sekvis vico de mallongaj prelegetoj, i.a. pri elektrizo de la svisa fervojreto (Ernst Glättli) kaj pri ĉeĥa-hungara kunlaboro en modernigo de motortrajnoj (Jindřich Tomášek).

El la abunda programo kultura kaj ekskursiva menciindas vizito al la Buda-peŝta Infan-fervojo, unika linio ĉe kiu deĵoras — krom la staciestroj kaj lokomotivestroj — nur infanoj inter 10-kaj 14-jaraj, sub inspekto de profesiaj fervojistoj.

En la kongresejo estis ekspoziciitaj artverkoj de e-istoj el la urbo Tata, samkiel lignoskulptaĵoj de Ferenc Jáki, Honora Membro de UEA.

La 53-a IFEF-kongreso (12-19 majo 2001) okazos en Tábor (Ĉeĥio), dum por 2002 kaj 2003 konturiĝas invitoj de Bulgario resp. Rumanio.

Laŭ raporto de István Gulyás

NAVIGE TRA TTT-PĀĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el
la inform-oceano de Tut-
Tera Teksaĵo. Sciigu nin pri
pluaj konsultindaj E-paĝoj!



KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ

Tel-Aviva UK: http://www.geocities.com/amik99_1999/, aŭ <http://uea.org/>, sub “UK 2000”. Anekdotoj kaj fotoj: <http://www.esperanto.org/uk2000/galerio1.html>; Internacia Infana Kongreseto: <http://www.esperanto.org/uk2000/iik/postiike.html>; fotogalerio de Beate Mielke (Berlino), kun portretoj de multaj kongresanoj: <http://www.esperanto.de/org/lv.berlin/Israelo/>; aŭd-vida raportaĵo: <http://esperanto-radio.net/whatis.htm>
86-a UK en Zagrebo: <http://pubwww.srce.hr/esperanto-kel/ukzagreb.htm>
Plena Kalendaro de Esperantaj Aranĝoj: <http://www.esperanto.hu/kalendar.htm>

LANDOJ, REGIONOJ

Esperanto en Berlino: <http://www.esperanto.de/org/lv.berlin/>
Brazilo, E-Klubo Zamenhof en San-Paŭlo: <http://www.domo.hpg.com.br/>
Ĉilia E-Asocio: <http://esperanto.cl/>
Unuiĝo Franca por E-o: <http://www.esperanto-france.org/>
Kebekia E-Asocio: <http://www3.sympatico.ca/esperanto/>
Esperanto Nederland: <http://home.hetnet.nl/~esperanto-nederland/>
Novzelandia E-Asocio, kun tri eseoj anglalingvaj, venkintaj en publika konkurso (vidu jun., p. 117): <http://www.geocities.com/esperanto-nz/>
Pli ol 250 ligoj en alfabeto ordo, al landaj kaj fakaj Esperanto-asocioj. “Ligoj al personaj aŭ komercaj paĝaroj estas aldonitaj kontraŭ € 12 jare”: <http://www.Esperanto.be/abc.html>

MUZIKO

La bando Dolcxamar (vidu p. 168): <http://www.nettie.fi/dolcxamar/>
La grupo Kajto: <http://www.xs4all.nl/~marianta/kajto.htm>
Muzika E-Ligo, kun kurso pri muziko: <http://esperanto.dragonfire.net/mel.htm>
Trattbandet, sveda ĵazbando: <http://www.m-media.se/trattbandet/esperanto.htm>

NAVIGE

La enhavo de ĉi tiu rubriko mem legeblas nun ĉe <http://esperanto.get.to/>

RELIGIO

La preĝejo de Överluleå en la urbo Boden (Svedio), zorge de paroĥestro Leif Nordenstorm: <http://www.svenskakyrkan.se/boden/high/esp.htm>

SCIENCO

Komputaj maŝinoj kaj inteligenteco, epokfara teksto (1950) de A. M. Turing: <http://www.forst.tu-muenchen.de/EXT/AIS/scio/turing/TuringEo.html>

CETERO

Indiĝenaj Dialogoj: <http://www.idnetwork.nl/central/esp/>
Interret-Tempa Transkalkulilo: <http://fsu.ch/it/>
Kamparana konfederacio de la fama José Bové, la sola ne franclingva prezento sur la paĝo: <http://www.confederationpaysanne.fr/qsnesp.htm>
N. I. Sequoyah, novaĵoj pri mortkondamnita esperantisto: <http://pss100.psi.ch/~claudio/crpp/fosters/fosters.html>

Kio NASKiĝas en Kalifornio?

Post sia 30-jariĝo, la fama somera kursaro trairas profundajn ŝanĝojn.

Post tri studoplenaj semajnoj, la 14-an de julio finiĝis ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato (SFSU) la 31-a Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), kiun partoprenis 45 homoj el deko da landoj. La ĉefinstruiston d-ro Grant Goodall (Usono) apogis Spomenka Ŝtimec (Kroatio) kaj Dennis Keefe (Usono/Francio). Reza Kheir-khah okupiĝis pri programoj ekster la klasĉambro kaj helpkursoj.

Ĉiutage okazis 3-horaj lecionoj en po 2 malsamaj niveloj matene kaj posttagmeze. La ĉiuvesperajn programojn prezentis ĉefe studentoj mem. La plej popularaj estis la internacia poezia vespero, la vespero de Gvatemalo, kaj la prezentoj pri japana kaligrafio kaj pri la lingva problemoj en Kanado.

La tagbulteno *NASKa Fasko*, kiun bonege redaktis studento Lee Miller, iĝis tiom populara ke post la matenmanĝo ĉiuj tuj serĉis ĝiajn interesajn artikolojn kaj originalajn verketojn, krom informoj pri programaj detaloj.

Sesio de la internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA partoprenis 4 studentoj,



Samtempe kun NASK, meze de San-Francisko videblis jena artprojekto, afiŝego sur teatra muro. Temas pri cito el la lernilo *Teach Yourself Esperanto*.

sub prizorgo de Alexander Shlafer.

Lokaj e-istoj multe kontribuis al pligrabligo de la kursaro, ekz. per piknikoj ĉe ges-roj Harmon kaj Harlow.

Vi povas legi *NASKa Fasko* kaj vidi fotojn ĉe <http://www.medialabinc.net/nask/nask.htm>, paĝaro konstruita de la 18-jara Timothy Westover.

Dum la diploma ceremonio oni oficiale informis ke ekde 2001 NASK okazos ne plu ĉe SFSU, tamen plej verŝajne ankoraŭ en San-Francisko. Oni sciigos pri la loko tuj post la fina decido. Nevizitintoj de NASK ne maltrafu la kursaron en la venonta jarmilo!

Laŭ raporto de Reza Kheir-khah - Irano/Japanio

ILEI: Amike, kvorume

Jam antaŭ la UK, ne en la kongreslando – malfavoraj cirkonstancoj por la 34-a Konferenco (15-21 julio) de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

Tio instigis nur 23 partoprenantojn el 10 landoj vojaĝi al Esperanto-Centro Kvinpetalo en Bouresse, en la koro de Francio.


La programo kunmetiĝis en amika kaj fruktodona kunlaboro nur surloke: temis i.a. pri gramatikaj prittraktoj de Georges Lagrange kaj Rob Moerbeek, kaj la prelego “Psikologio en lingvolernado” de Jean Berbaum. Kvorume kunsidis 14 komitatanoj de ILEI, konfirmante la okazigon de la sekva konferenco en Kroatio (28 jul. - 04 aŭg. 2001, Savudrija) kaj la elekton de Mariana Evlogieva kiel sekretario. Ili akceptis la demision de estrarano Carlo de Lorenzi, apogis la proponon ke la vakajn estrarajn lokojn okupu Charles Donoghue kaj PENG Zhengming, kaj — por stabiligi la estraron — akceptis ke aliaj estraranoj ne estu devigataj demisii je la fino de sia mandato en 2001.

Ĉar la kostoj produkti *Internacia Pedagogia Revuo* superas la rimedojn el kotizoj, leviĝis la ideo trovi malpli kostan presejon, ekz. en Bulgario. Studgrupo rekomendis i.a. starigi fonduson helpe al seminarioj por instruista trejnado, kaj disvastigi informojn pri la projekto Euroscola, kiu celas ke lernejoj klasoj el diversaj landoj, lernintaj E-on, vizitu la ejon de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo. (Vidu <http://panorama.ovh.org/europpo>.)

Laŭ Internacia Pedagogia Revuo

Internacia Kongresa Universitato

En Zagrebo okazos la 54-a sesio de IKU, kie rajtas prelegi universitataj profesoroj aŭ personoj kun simila kvalifiko. Ili estas invitatataj sendi siajn prelegproponojn al la sekretario de IKU-komisiono, **prof. d-ro Hans Michael Maitzen (Endemanngasse 6-18/1/24, AT-1230 Wien, Aŭstrio; maitzen@astro.univie.ac.at)** kaj al la **Centra Oficejo de UEA** (kongresa fako). La propono enhavu: koncizan resumon de la prelego (ĉ. 200 vortoj maksimume); koncizan biografion kaj personan bibliografion. Necesas aldoni ankaŭ foton taŭgan por publikigo. La prelegoj prefere (ne devige) rilatu al la kongresa temo “Kulturo de dialogo — dialogo inter kulturoj”. La elektitaj prelegantoj ricevos modestan honoraron, sed ne repagon de siaj kostoj. Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Aparte bonvenaj estas junaj kandidatoj aŭ tiuj kiuj ankoraŭ ne prelegis en IKU. **Limdato por kandidatigo: 15-a de januaro 2001.**



Recenzoj

Beletra

Koreaj kordoj

Korea antologio de noveloj. Komp. CHO Sung Ho, KIM Uson. El la korea trad. Verda E. Kim, KIM Uson k.a. Seulo: Korea E-Asocio, 1999. 339p. 22cm. € 21,60.

La liberpoeto (1938). Dan Tirinaro (Ĝong Sasop, 1910-44). Seulo: Korea Esperanto Asocio, 1999. 203p. 22cm. Ilus. € 10,80.

Birdoj sen flugiloj. Dan Tirinaro. En la korean trad. KIM Uson, KIM Yocho. Seulo: Segimunhak, 1999. 214p. 22cm. Dulingva: E-korea. € 16,20.

Jen pakaĵo kun tri koreaj libroj: ĉiuj kun glata surfaco, bone kaj bele presitaj, ĉiu kun ampleksa antaŭparolo kaj enhavtabelo. Ĉiuj allogas. Kie mi do komencu?

Mi malfermas la unuan, *Korea antologio de noveloj*. El ĝi saltas mondo vibranta je vivo. Rakontoj kortuŝaj kaj amuzetaj, sortoj kun politika fono kaj historioj pri simpla homa vivo. Tra la noveloj fariĝas palpebla la korea vilaĝa vivo, en kamparo, montaro kaj ĉe la maro: mizero kaj maltoleremo unuflanke, familia kaj socia ligoj kaj subteno aliflanke. Kelkloke aperas urboj, rompiĝo inter kampara kaj urba vivo, kaj politiko. La dividiĝo de la Koreioj, milito, adaptiĝo al nova realo estas temoj de pluraj el la noveloj, sed la grandaj, tutmonde konataj temoj restas fone. Plej gravas la homaj rilatoj kaj ilia evoluo, kaj la evoluo interne de la protagonistoj mem. Forta homeco karakterizas la tutan verkaron, kiu nek juĝas nek kondamnas, sed simple rakontas.

La Antologio montriĝis aventuro tra la Vivo, kun ĉiuj ĝiaj flankoj. Mi ŝatus gratuli la tradukintojn pro bona lingvaĵo kaj lertaj turnoj, kaj esprimi la deziron je pli da koreaj — kaj aziaj — noveloj kaj romanoj en Esperanto.

Dan Tirinaro, en Esperanto (*La liberpoeto*) kaj dulingve en la korea kaj Espe-



Dan Tirinaro

ranto (*Birdoj sen flugiloj*), kaŭzas al mi pli da cerbumado. La poemoj de Tirinaro, kiu studis en Francio en la 30-aj jaroj (la poemaro aperis en Parizo en 1938), ne estas tiom poeziaj kiom opiniaj. Li forte opinias pri la vivo, sia ĉirkaŭaĵo, pri la mondo. Lia kuraĝo kaj kontraŭstaro al la oficialaj strukturoj kaj ĝenerale akceptataj "veroj" kreskas kun la poemoj. Li ne lasas sin trompi de bela ekstera aspekto. Li iras rekte al la koro de la aferoj per simboloj kiuj kreas nur maldikan vualon super la realo.


Tirinaro ne nur posedis akran okulon, sed ankaŭ lia fono helpis al li klare vidi la eŭropan vivon. La poemaro estas atesto de juna aziano pri Eŭropo, Eŭropo kiu staris antaŭ mondmilito kaj banis sin en propagando kaj memkontenteco. Mi ege ĝojas ke aperis tiuj ĉi volumoj de Tirinaro, ne nur ĉar tio ŝtopas truon en la historio de la azia E-literaturo; temas ankaŭ pri "fotoj" de la tempo, kaj pri persona atesto de junulo kiu esploris la mondon kaj sin mem.

En ĉiuj tri verkoj ege helpus al la leganto se aperus piednotoj aŭ vortareto. Por neinicita leganto pluraj aludoj kaj mencioj de nomoj aŭ lokoj restas malklaraj. Sed ankaŭ tiel ĉi tute bone eblas ĝui la verkojn, en si mem ĝuindajn.

Sabira Ståhlberg · Finnlando/Bulgario

Taglibro sur scenejo

De tajgo al minaretoj. Aktoraĵo laŭ la taglibreto de Ada Sikorska-Fighiera. Jadwiga Gibczyńska (1924). Rotterdam: UEA, 2000. 18p. 21cm. € 3,00. Triona rabato ekde tri ekz.



Jadwiga Gibczyńska ekhavis la bonan ideon verki monodramon laŭ la ĉi-supre menciita libreto. La militaj travivaĵoj de Ada Sikorska-Fighiera ja estas ne nur interesaj, sed samtempe ili rememorigas tre meritplenan samideaninon.

Komence la aktorino alparolas la publikon kaj montras la taglibreton de Ada. Poste ŝi prezentas sin kiel la onklinon Helena Terlecka, al kiu Ada kiel 11-jarulino skribis leterojn el siaj ekzilklokoj. Helena aŭ "onjo Lunja" — la karesnomo de Ada por ŝi — rakontas pri la najbara Sikorski-familio, pri la deportado de la patro, la generalo Sikorski, de kiu ili post 1940 ne plu ricevis leterojn.

Venis la tago kiam ankaŭ Ada kun la patrino, la avino kaj fratineto ekziliĝis.

Jadwiga nun legas fragmentojn el la leteroj de Ada, kiuj formas la ĉefajon de la monodramo. Tamen inter ili la "onkino" komentarias, eksplikas.

Tiel estiĝas sufiĉe da vario por teni la atenton de sendube entuziasma publiko.

Rejna de Jong · Nederlando

Estas tempo rekotizi por 2001!

Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de ĉi tiu revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo kaj ŝparas monon al UEA. Antaŭdankon!

Sarkasmo kaj humuro

Plutoso (388 a. Kr.). Aristofano (ĉ. 445-385 a. Kr.). El la helena trad. (1906)

Eugène Noël. Komentarioj de José F. Martín del Pozo. 62p. € 2,40.

Dialogoj de la dioj. Lukiano (ĉ. 125-180). El la helena trad. José F. Martín del Pozo. 46p. € 1,80. Ambaŭ: [Malaga:] Andaluzia E-Unuiĝo, 1998. 21cm.

Kiam Plutoso, la blinda dio de la riĉo, kiu blinde favoris aŭ preterpasis la homojn, iĝas vidulo danke al Kremilo kaj vidas ĉies meritojn, realiĝas la revo pri deca monavido de ĉi tiu, malriĉa virtulo kiu volas esti riĉa anstataŭ la "ruzaĵ friponoj" kiuj jam estas riĉaj: de nun, ne necesas plu esti ruza fripono por riĉiĝi, ĉar filistrajn virtojn financas la ĉiopova dio.

Penia, diino de la Malriĉo, proponas la tradician grekan mezuratecon: malriĉan sed dignan vivmanieron per laboro, same for de la senmezureco de pigra riĉo kiel de la defalo en maldignan mizeron. Vane. "Konvinku min, mi konvinkita ne restos", konkludas Kremilo.


Aristofano volas ridigi la popolon. Cele al tio, stereotipajn kaj karikaturajn personojn bone rekoneblajn li komparas kun neatingeblaj idealoj, aŭ priskribas ecaĉojn pri kiuj liaj personoj

ne kulpas. Sed, ridigante la popolon per siaj kruelaj sarkasmoj, li eĉ pli kruele ridindigas ĝin: li revigas tiun popolon pri mondo kie oni ne povas revii, kie la terura malsato je oro de la homoj estas la tuta realo, la sola eblo kaj la unika penso. Je la fino de la komedio,

la pastro de "Jupitro Savanto" forlasas sian dion por servi la dion de la Mono. Ĉu Aristofano ricevis, krom inspiron poezian, ankaŭ profetan?

Pri la traduko de E. Noël, jam la prologo avertas nin pri iuj, niaepoke, strangaĵoj (*novdio, la ĉiom, kiela-tiela*

k.a.). Ĉe la recenzisto, tiuj arĥaismoj (pli bone ol strangaĵoj) nur spicas klasikaĵon pli "klasike".



Tamen, nomi "Mizero" la grekan Penian estas nepardonebla fuŝo, kiu povus tute miskomprenigi la verkon: kial ne "Malriĉo"?

Lukiano de Samosato estas nek amara nek profunda kritikisto, sed amuza, gaja kaj arta klaĉisto. Mortemulo tute ne religiema, li tamen tre tolere kaj bonhumore

raportas al ni la malbonintencajn klaĉadojn kaj venenajn lingvopaĵojn de la senmortaj dioj kontraŭ la aliaj olimpanoj.

Ĉu vi kredas, ekzemple, ke Akteono estis vorita de siaj hundoj pro tio ke li vidis la hontindaĵojn de Artemisa nuda? Ho ne! Fakte, Artemisa furiozis ĉar kion Akteono vidis, ne estis tiel bela kiel tio kion li imagis. Kaj ŝi timis ke Akteono raportos.

Atendu, tio ne estas ĉio: eble

Artemisa eĉ ne estas tiel virga kiel ŝi kredigas... Sed mi ne povas ĉion diri. Legu do *Dialogoj de la dioj*, se vi volas aferojn scii.

La traduko estas fidela, preskaŭ laŭvorta kaj agrabla. La piednotoj tre utilas, ĉar oni ne ĉiam konas ĉiujn. Tamen, pro la abundaj aludoj al antaŭaj faroj de la gedioj kiuj regas nin, mi konsilus havi apude bonan grekan mitologion. Tiel, ĉar la plej ĝuiga klaĉado temas pri konatoj, vi eltiros la tutan sukcon el la frandaĵoj de Lukiano.

Higinio García · Kanado

Gramatiko

Por alproprigo de tradicia koncepto

Gramatiko de Esperanto. Dua eldono plilarĝigita. Miroslav Malovec (1953).

Dobřichovice: Kava-Pech, 2000. 135p. 20cm. € 15,00.

Ekzistas du ĉefaj manieroj verki gramatikojn. La maniero lingvistika estas priskribi; ĝi montras la lingvon tia kia ĝi estas, uzante sciencajn esplormetodojn, ekz. statistikon de realaj lingvotekstoj. La maniero didaktika estas preskribi; ĝi montras la lingvon tia kia ĝi devas esti (kaj kia ĝi ne devas esti).

Post la eldono de PAG de Kalocsay kaj Waringhien, pli facile eblas verki didaktikan gramatikon de E-o, koncizigante kaj reordigante ĝian materialon. Ankaŭ la gramatiko de Malovec enhavas la kutiman strukturon kaj temaron, kaj lernema kursfininto povos utiligi ĝin por alproprigo de la tradicia koncepto pri la lingva strukturo de E-o.

Ke tion la aŭtoro intencis, montras la librofina "Literaturo", kie mankas ekz. la libroj de J. Wells (1978) kaj C. Gledhill (1998). Tiusence pravas G. Mattos, kiu diras antaŭparole ke la gramatiko de Malovec "respondos al la plej oftaj problemoj

de nia regula, sed tute ne facila lingvo". Se iuj ne kontentos pri tiuj respondoj, ili konsultu *Lingvaj respondoj* de Zamenhof (ial ankaŭ ĝi mankas en la "Literaturo") kaj de Sergio Pokrovskij (1999), legu la aluditajn verkojn de Wells kaj Gledhill, kaj provu trovi la kajerojn de *Planlingvistiko* kun la gravaj studoj de J. Lindstedt pri PAG (n-roj 1, 3, 6) kaj R. Rokicki pri la Esperanta morfemaro (n-roj 7-12).

Estas interese ke, krom la kutimaj ĉapitroj pri leksiko, fonetiko, ortografio, vortfarado, morfologio kaj sintakso de E-o, en la libro estas ĉapitroj pri lingvoevoluo, stilstiko kaj tradukado — ja laŭ Malovec ĉiu lingvo "devas esti sufiĉe malsimpla kaj komplika, por ke ĝi kapablu esprimi ĉiujn ideojn, ĉiujn delikatajn nuancojn de la homa pensado, kiujn la uzantoj bezonas esprimi en la vivo, laboro kaj literaturo".

Aleksander Korjenkov · Ruslando

**Ĉu vi jam subskribis
Manifeston 2000?**
www.uea.org/2000.html



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

estas via asocio.

Kiel membro de UEA vi apartenas
al komunumo de esperantistoj
en 120 landoj.

www.uea.org

KOTIZTABELO DE UEA POR 2001

La jenaj tarifoj validas ankaŭ por postaj jaroj, se la pago estos farita antaŭ la 30-a de septembro 2001.

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	14	34	85	51	31	170
Aŭstrio/ŝilingo	105	265	660	420	250	1320
Belgio/franko	310	775	1940	1235	740	3880
Britio/pundo	5	14	34	21	13	68
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	630	380	2100
Danio/krono	55	140	355	230	135	710
Eŭro-landoj	8	19	48	31	18	96
Finnlando/marko	45	115	285	180	110	570
Francio/franko	50	125	315	200	120	630
Germanio/marko	15	38	94	59	36	188
Greklando/drakmo	2200	5400	13500	8600	5200	27000
Hispanio/peseto	1200	3000	7400	4700	2800	14800
Hungario/forinto	1200	3100	7700	4600	2800	15400
Irlando/pundo	6	15	37,75	24	14	75,50
Islando/eŭro	8	19	48	29	17	96
Israelo/eŭro	6	16	39	23	14	78
Italio/liro	15000	37000	93000	59000	36000	186000
Japanio/eno	900	2200	5500	3300	2000	11000
Kanado/dolaro	12	30	75	45	27	150
Nederlando/guldeno	17,63	41,87	105,78	68,32	39,67	211,56
Norvegio/krono	65	165	415	250	150	830
Nov-Zelando/dolaro	16	40	100	60	36	200
Portugallio/eskudo	1400	3400	8500	5400	3200	17000
Slovakio/krono	190	480	1200	720	430	2400
Svedio/krono	70	170	430	275	165	860
Svislando/franko	12	31	78	47	28	156
Usono/dolaro	8	20	50	30	18	100
TARIFO A/eŭro	5	13	32	19	11	64
TARIFO B/eŭro	4	10	24	14	9	48

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio, Liĥtenŝtejno laŭ Svislando.

TARIFO A: Honkongo, Korea Resp., Malto, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG:

Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM: Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 2,5-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

JES, mi volas membriĝi en UEA!

Mi membriĝas por la jaro 20____ en kategorio: ☐ MG / ☐ MJ / ☐ MJ-T / ☐ MA / ☐ MA-T / ☐ DM.

Mi volas aboni la revuojn: ☐ SA (*Esperanto*) / ☐ Kto (*Kontakto*).

Mi volas aldone subteni UEA/TEJO pagante por: ☐ SZ (Societo Zamenhof) / ☐ PT (Patrono de TEJO).

Mi pagas la sumon de _____ (bv. indiki valuton).

Mi krome pagas la sumon de _____ (bv. indiki valuton) por la persono indikita dorsflanke.

Pagmanieroj:

☐ Mi pagas al la kotizperanto en mia lando (vidu p. 35-38 en Jarlibro 2000).

☐ Bv. debeti mian UEA-konton, kie estas sufiĉa bonhavo.

☐ Mi pagas al poŝta konto de UEA (por pago al konto ekster via lando bv. aldoni 5 eŭrojn / 11 guldenojn).

☐ Bv. debeti mian American Express / Visa / Eurocard / Mastercard / Access / JCB:

|_|_|_|_| |_|_|_|_|_| |_|_|_|_|_| |_|_|_|_|_| valida ĝis: ____ / ____.

NOMO _____ UEA-KODO (se konata) _____

ADRESO _____

_____ NASKIĜJARO _____

DATO _____ SUBSKRIBO _____

Poŝtaj kontoj de UEA: Nederlando 378964; Belgio: 000-1631831-97; Germanio (Köln) 3182 91 509 BLZ 370 100 50;
Svedio 74374-0; Svislando (Bulle) 12-2310-0

Mi (nomo) _____ donacas:

• membrecon por la jaro 20_____ en kategorio:

☐ MG / ☐ MJ / ☐ MJ-T / ☐ MA / ☐ MA-T / ☐ DM

• abonon al la revuoj:

☐ SA (*Esperanto*) / ☐ Kto (*Kontakto*)

al:

NOMO _____ UEA-KODO (se konata) _____

ADRESO _____

_____ NASKIĜJARO _____

Mi ne (re)membriĝas, ĉar: _____

Bv. resendi al Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Laste aperis



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!

Amoj kaj amantoj. Edgard Jamart (1929). Debrecen: Debrecena E-Societo, 2000. 60p. ISBN 963 00 2753 4. 21cm. Historiaj, mitologiaj, literaturaj riprenoj pri amo kaj amoro. € 5,40.

Barbaraj sonoj kaj sonetoj. Geraldo Mattos (1931). Chapecó: Fonto, 2000. 80p. 21cm. Kolekto de sepdek da sonetoj kaj poemoj. € 5,40.

Bibliografio de Scienca Revuo. *La enhavo de Scienca Revuo 1988-2000(1)*. Red. Rudi Hauger. Zürich: Internacia Scienca Asocio E-lingva, 2000. 94p. 21cm. Kun suplemento pri la numeroj 1982(3)-1987. € 9,00.

Enciklopedio pri la estona Esperanto-movado. Kompilis Jaan Ojalo (1914). Tallinn: E-Asocio de Estonio, 2000. 86p. ISBN 9985 9130 4 3. 20cm. Ilus. Kun kapvortoj pri agantoj, kluboj, revuoj ktp. € 9,90.

Enkonduko en la japanan. Yamasaki Seikō (1929). Chapecó: Fonto, 2000. 181p. 21cm. Dudek lecionoj por eklerni la japanan lingvon. Literumo per la latina alfabeto. Apendica vortareto dudirekta. € 19,80.

En la komenco estas la vorto. Geraldo Mattos (1931). Chapecó: Fonto, 2000. 166p. 21cm. Studo pri vortkunmetado, "sintakso de la vorto". € 9,90.

En lando de vulkanoj. Rakonto pri bicikla vojaĝo tra Kamĉatka duoninsulo. Dmitrij M. Cibulevskij (1946). Ĥarkiv: la aŭtoro, 2000. 44p. 21cm. Fotoj. Spertoj el 1985. € 4,20.

Eola harpo. Mikaelo Gišpling (1924). Moskvo: Eŭropa Jura Universitato Justo, 1999. 106p. 21cm. Dua poemaro de la aklamita aŭtoro de *El sisma zono*, "poeziaj resonoj de eventoj aŭ meditoj" de la lastaj jaroj. € 7,50.

Esperantaj sinonimoj por japanlingvanoj. Saka Tadasj. Tokio: Japana E-Instituto, 2000. 4+151p. ISBN 488887 016. 21cm. Japanlingva. Multaj ekzemplofrazoj. Dank' al indekso iom utila ankaŭ por alilingvanoj. € 12,00.

Jen libroj el tri sferoj: natura, supernatura kaj... movada!



Europa della cultura e Europa delle lingue. Prospettive per il nuovo secolo. Andrea Chiti-Batelli. Manduria: Lacaita, 2000. 109p. 24cm. Itallingva. Pri la problemo pluvivigi la eŭropajn kulturojn kaj lingvojn, "minacatajn de la detrua tajdo de la angla lingvo". € 12,00.

Internacia Scienca Dokumentaro 1996-1999. Registro de internacilingvaj sciencistoj konataj al Akademio Internacia de la Sciencoj. Moskvo: Eŭropa Jura Universitato Justo, 1999. 202p. 21cm. Adresoj, fakoj kaj lingvokapabloj de centoj da sciencistoj. € 10,50.

Kompendio de la Esperanta gramatiko (1958). Por superaj ekzamenoj. Mirko Manner-Mamužić (1928-98). Zagreb: E-Societo "Bude Borjan", 2000 (2-a, ŝanĝita eld.). 109p. ISBN 953 98127 0 4. 24cm. Konciza, klara, kompleta prezento. € 12,00.

Kritische Analyse des Grossen Wörterbuches Esperanto-Deutsch von Erich-Dieter Krause. Reinhard Haupenthal (1945). Schliengen: Iltis, 2000. 15p. ISBN 3 932807 13 8. 21cm. Germanlingva. Analizo de granda Esperanta-germana vortaro. € 3,00.

Kvinpinta kantaro 2000. Kompilis Sten Johansson. Skövde: Al-fab-et-o, 2000. 72p. ISBN 91 973467 9 9. 21cm. Kun tekstoj, notoj kaj gitarakordoj. Kvindek da kantoj

originalaj kaj tradukitaj; pluraj aperas premiere. € 6,30.

Leksikaj ekskursoj. *Dua volumo.* Christiane De Vlemminck kaj Emile Van Damme (1927). Antverpeno: Flandra E-Ligo, 2000. 204p. ISBN 90 71205 77 0. 20cm. Ekskursoj tra nia lingvo por riĉigo de la vortrezoro, kun aparta atento al tipe Esperantaj temoj. € 14,70.

Lernu paroli Esperante. *Lernilo por paroligaj kursoj.* Dmitrij M. Cibulevskij (1946). Ĥarkiv: la aŭtoro, 1999. 54p. 21cm. Helpilo por daŭriga studado. € 4,20.

Malgranda gvidlibro pri Moskvo. Nikolao Gudskov (1953), Natalia Aroloviĉ (1953). Red.

Viktor Aroloviĉ. Moskvo: Impeto, 2000. 87p. ISBN 5 7161 0071 6. 22cm. Ilus. € 6,00.

Metamorfozo, La (1915). Franz Kafka (1883-1924). El la germana trad. Reinhard Haupenthal. Chapecó: Fonto, 2000. 58p. 21cm. "La plej perfekta novelo de la germana literaturo" (M. Nervi), en traduko kiu celas superi la esperantigojn de Nervi kaj de V. Lutermano. € 6,60.

Minakata Kumagusu. Toniŝi Jooko. Ilustris Macuŝita Ĉie. El la japana trad. Harukuni Egaŭa. Wakayama: Ŭakajama Bildolibra Societo, 1999. 64p. 18cm. Dulingva: E-japana. Bildlibro pri multflanka sciencisto kaj frutempa naturprotektanto (1867-1941). € 9,30.

Naturkuracado 2000. La jarlibro de Internacia Naturkuraca Asocio (INA). Red. Harald Schicke, Puramo Chong. Püttjerberg: MZ-Verlag, 2000. 99p. ISBN 3 89240 112 8. 22cm. Kun artikoloj pri herbokuracado, akupunkturo, Yumeiho-terapio ktp; organizaj informoj de INA. € 9,90.

Ni kantu! Kolekto de 108 hungaraj popolkaj laboristaj kantoj. El la hungara trad. Kálmán Kalocsay k.a. Budapeŝt: 2000. 62p. 16cm. Bind. Biblioŝila represo de la eldono el 1928, pro kies revoluciaj kantoj eldonisto Bleier (eldononto de *Literatura Mondo*) estis enprizonigita. € 24,00.

179

Kaj blue...



BLINDULOJ: IKBE en Bulgario

Kunvenis 93 vidhandikapitoj kaj akompanantoj el 14 landoj por la 66-a Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj (IKBE, 5-12 aŭg., Plovdiv, Bulgario). Pri la kongres-temo "Komunikado sen limoj en la 21-a jc." prelegis Spas Karafezov, estro de la Centra Biblioteko de Blinduloj en Sofio, kaj Nadja Ĵukova ("Tri ŝlosiloj en la komunika- do — brajlo, E-o kaj Interreto"). Sekcie kunsidis redaktoroj de E-revuoj, komercistoj, ŝakistoj kaj muzikistoj. Du kandidatoj sukcesis mez-nivelo ĉe la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI. La sekva IKBE okazos en Zagrebo (14-21 jul. 2001). (M. Evlogieva)

EDUKADO: En packongreso

Mireille Grosjean, Ĝeneva repre- zentanto de UEA ĉe UN kaj tiu

de ILEI ĉe la Internacia Buroo de Edukado de Unesko, partoprenis en Parizo kongreson de Inter- nacia Asocio de Edukistoj por Monda Paco (8-13 julio) kaj, laŭ invito de ĉi ties gvidantaro, en- iris ĝian Internacian Kunordigan Grupon kiel reprezentanto de UEA kaj ILEI.

ETNISMO: IKEL pri Francio

Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (ikel@bigfoot.com; <http://Beam.to/IKEL>) instigas e- istojn skribi al reprezentejoj de Francio, por ke ĉi tiu ratifu la Eŭropan Ĉarton por Regionaj aŭ Minoritataj Lingvoj.

POLITIKO: Partie por Esperanto

Esperanto-Partio de Britio (46B Esplanade, Burnham-on-Sea, Som- erset, Britio, GB TA8 2AQ; uk@e-p.org; <http://www.e-p.org>), fondita la 15-an de dec. 1999, intencas propagandi E-on en la politika areno kaj proponi kandidatojn al la Eŭropa Parla- mento en 2004. La partio evolu-

MUZIKO: AFERO POR GARDI

Bruno Gou- veia, kantis- to fama en Brazilo, el la grupo Biqui- ni Cavado, partoprenis en la kanto "Aferoj por gardi" de la nova KD de Merlin (vidu p. 179).

Merlin kaj Bruno aperis en alloga intervjuo de regiona TV-stacio. Vidu <http://www.viva>




igos siajn vidpunktojn divers- temajn, sed sekretario Neil MacKilligin kaj kasisto Craig Bootz nun ĉefe celas starigi kaj efike administri la organizaĵon. Ĝi esperas ke e-istoj fondos pro- prajn por-Esperantajn partiojn en aliaj eŭropaj landoj.

POPOLDANCO: 20 jarojn E-o
La 20-an fojon okazis (9-11 jun.)

VIRINA AGADO: ORNAMI AŬ LABORI?

Pasis du jaroj de kiam fondiĝis laborrondo pri "virina agado". En ĝia kunveno dum la UK, sub gvido de Choi Yun-Huy (Hortensio, plej maldekstre), 25 ĉeestantoj konstatis ke ili havas pli kaj pli konkretajn proponojn, kaj ke baldaŭ estos tempo peti aliĝon al UEA. Aŭdiĝis ke eĉ en Esperantujo oni ofte elektas virojn por labori kaj virinojn por ornamo, dum necesas ke elektigu multe da virinoj agemaj kaj laboremaj. "Virina agado" daŭre havos kunvenojn en estontaj UK-oj kaj aziaj kongresoj. (Hortensio, *Stel-Avivo*)





biquini.com.br/novidades/noticias/200003.html. (R. Resende)

Internacia Renkontiĝo de Popolaj Orkestroj en Toruń (Pollando). En 20 jaroj entute 184 grupoj prezentigis sur scenejo de la Etnografia Muzeo. Ĉiu el la 94 eksterlandaj grupoj el 25 landoj estis invitita helpe de Esperanto, kaj ĉiu venis kun e-ista tradukanto. La ĉi-jaraj invititoj, po ses grupoj el Pollando kaj el eksterlando, kantis ankaŭ Esperante dum

aparta renkontiĝo por e-istoj. Pri la aranĝo abunde informis la lokaj gazetoj kaj televido, menciante la rolon de E-o. (T. Nemere)

SKOLTOJ: Salto el alto

Dum granda skolta tendumado en Brazilo (2-a AJURI), okaze de la malfermo ĉiuj flagoj venis el la ĉielo, paraŝute. Kiel lasta surterigis la Esperanta flago, sed ĉi tiu salto estis la plej eleganta kaj preciza. En la aranĝo skoltestro Roberto Resende, ano de Skolta E-Ligo (<http://www.esperanto.org/skolta>), gvidis la aktivaĵojn pri internaciaj skoltaj kontaktoj. (R. Resende)

TURISMO: "Kial ĝuste?"

"Kial ĝuste Nagykanizsa?" estas 6-paĝa kolora prospekto pri la hungara urbo kiu preparas sin por SAT-kongreso en 2001 (vidu p. 170). Havebla, kontraŭ 1 USD da sendokosto, de Tibor Szabadi (Pf. 66, HU-8801 Nagykanizsa, Hungario; esptibor@egon.gyaloglo.hu). Por plia dolaro haveblas 4 glumarkoj kongresaj.



ARGENTINO: Patagonie

En la plej grava ĵurnalo de la argentina Patagonio, *Rio Negro*, aperis la 2-an de aŭg. iom longa intervjuo kun la prezidantino de Argentina E-Ligo, Silvia Rottenberg, la ĉefdelegito Rodolfo Calógero kaj delegito Rubén Sánchez. (R. Sartor)

BULGARIO: Teleteksta kurso

Iniciate de Mariana Evlogieva, ekde 6 majo la teleteksto de la bulgara privata televido 7 dni montris E-kurson por komencantoj. (R. Androvska)

JAPANIO: Kunloĝo loga

Duonpaĝa kolora raporto (8 majo) pri la Tutlanda Kunloĝado (3-7 majo) kaj pri E-o titoliĝis "Esperanto, alternativo al la lernado de la angla" en *The Daily*

Yomiuri, angla versio de *Yomiuri*, la japana ĵurnalo kiu estas plej grandkvante eldonata en ambaŭ lingvoj. La artikolo konkludas ke, senrigarde al la grandeco de la E-parolantaro, "tio ke lingvo ne ŝirmata de etnaj ligoj travivis kaj kreskis dum 113 jaroj, ŝajnas indiki ke ĝi ja havas internan allogon, almenaŭ por homoj internaciemaj".

NORVEGIO: Draper semas

En majo kaj junio aperis E-rilataj artikoloj kaj leteroj de Douglas Draper en ses norvegaj periodaĵoj, de la pacifista revuo *Fredsviljen* ĝis la granda taggazeto *Aftenposten*. (Norvegia E-isto)

POLLANDO: Pettyn en Salono

En januaro en la pola monata magazino *Salon Polski* Andrzej Pettyn aperigis dupaĝan artikolon pri "Doktor Esperanto".



Kun viaj kontribuaĵoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — koran dankon!

Oficiala informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brazilo: Itacir Luchtemberg. Ĉinio: CHOI Man-won. Hispanio: Paulo Méiz Irache. Japanio: HASAH KAZUO, ISAKI Mitiko, TADAISI Tizuko.

PATRONOJ DE TEJO 2000

Belgio: Elvira de Coene. Francio: Denise M. H. Loisel; Marc Savre.

SOCIETO ZAMENHOF 2000

Aŭstrio: Florence Cool. Brazilo: Gilbert R. Ledon; Symilde Schenk Ledon. Finnlando: Harri Tuomola. Francio: Maurice Sujet. Germanio: Doris Freess; Oliver Walz. Hispanio: Josep Castellort i Riba. Japanio: Yoriko Itō; Sugano Takeo. Kanado: Matthew Chisholm. Litovio: Povilas Jegorovas. Norvegio: Tomas Jansson. Portugalio: José M. Gaspar Martins. Slovenio: Jožica Židanik. Usono: Alberta Seabold Casey.

DONACIOJ 2000 (EUR)

ĝis la 31-a de aŭgusto

Asocio Kapitalo: Britio: J. Campbell 790,12. Sumo ĉi-jara: 1017,01.

Fondaĵo Afriko: Germanio: E-grupo Villingen-S. 102,26. Hispanio: F. Conejero Sánchez 42,07. Nederlando: F. J. Pieterse 45,38; A. S. A. de Vries 45,38; anone 516,33; L.A. Pourier 22,69; Stichting Theo Thijssen 7,94; J. G. L. M. Verheijen 1815,12; F. H. Kat 45,37; J. C. van Veenendaal 22,69. Svedio: J. Hammarberg 71,04. Sumo ĉi-jara 7966,48.

Fondaĵo Ameriko: Aŭstralio: D. McGarney 49,94. Brazilo: M. Borges dos Santos 67,00; J. R. Piton 34,62; W. Ventura Rego 58,00. Britio: M. H. McClelland 5,46. Finnlando: T. Sormunen 50,00; A. Karkainen 84,09. Svedio: J. Hammarberg 23,68. Venezuelo: J. E. Bachrich 100,00; M. Bachrich 100,00. Sumo ĉi-jara: 2270,16.

Fondaĵo Azio: Japanio: Y. Hotta 19,74; M. Osioka 19,74; T. Saitou 19,74; H. Tani 19,74; I. Hasimoto 41,03; H. Oosawa 20,51. Sumo ĉi-jara: 3888,41.

Fondaĵo Canuto: Francio: C. Longue-Épée 52,00. Germanio: H. Erhard 51,13; K. E. Salzmann 8,00; H. Schindler 60,00. Japanio: W. Schmid 206,00. Kanado: S. T. Norvell 30,00. Nederlando: A. E. Moerbeek-Prins 124,79; F. J. Pieterse 45,38; F. D. van Zoest 11,35; A. Ploeg 11,34; G. A. M. van Bergeijk 50,00; F. H. Kat 45,37; I. M. Krab 10,15. Sumo ĉi-jara: 1696,28.

Junulara Fondaĵo: Finnlando: K. Hautamaki 10,00. Nederlando: F. H. Kat 45,38. Sumo ĉi-jara: 1783,37.

Kampanjo 2000: Germanio: H. Klünder (por eks-YU) 2268,90. Nederlando: N. J. van Iperen-de Vries 22,69. Sumo ĉi-jara: 2320,17.

Konto Espero: Nederlando: F. D. van Zoest 11,35; F. H. Kat 45,38. Sumo ĉi-jara: 301,49.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Nederlando: F. D. van Zoest 11,35. Sumo ĉi-jara: 1207,14.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Brazilo: J. R. Piton 15,00. Germanio: H. Schindler 60,00. Hispanio: P. Meliz Irache 9,50. Kanado: S. T. Norvell 30,00. Nederlando: A. Ploeg 11,35. Sumo ĉi-jara: 468,89.

Volontula Fondaĵo: Brazilo: J. R. Piton 10,00. Germanio: M. Bettmann 25,00. Nederlando: A. Ploeg 4,54; F. D. van Zoest 11,35. Sumo ĉi-jara: 342,28.

Generala Kaso: Danio: P. K. Poulsen 24,84. Francio: P. Grollemund 1,84. Nederlando: F. D. van Zoest 34,05; A. L. Roode 37,38. Svedio: S. Fjordland 81,06. Usono: J. Muelver 110,90. Sumo ĉi-jara: 1353,74.

Al ĉiuj tre koran dankon! *UEA*



BOLOGNESI: Bretona vojaĝo

La prezidanto de Internacia Fervojista E-Federacio, d-ro Romano Bolognesi (59-jara) vojaĝis kun sia edzino de 28 majo ĝis 26 junio en Bretonio. Li prelegis en E-o, kun franca traduko, en 9 urboj pri la origino de la lingvokapablo kaj de la skribo, kaj respondis al demandoj de lernejoj pri la vivo en Italio. Regionaj gazetoj plurfoje kaj bele raportis pri la restado de ges-roj Bolognesi en Bretonio. (J. Ducloyer)

CHEN: Rifuzis podion

Membro de la Patrona Komitato de UEA, CHEN Yuan (82-jara) partoprenis la Tel-Avivan UK "kiel ordinara samideano", tial li kategorie rifuzis sidlokon sur la podio. Li diris ke li rigardas "la ĉi-fojan E-renkontiĝon kiel lastan agon en sia kariero". (El Popola Ĉinio)

GOTOU: Tempo ne estas mono

Multaj legantoj interesiĝis pri la persono de s-ro Mituo Gotou, kiu donacis al UEA sumon de ĉ.

900 mil eŭroj. Al demando de nia revuo la 79-jara mecenato respondis nur ke la donaco "estas nenio alia ol kompensaĵo de multjara neaktiveco" en la E-movado, per monsumo kiu "devenis de hazarda plialtiĝo de akcioj". S-ro Gotou opinias jene: "Oni diras ke tempo estas mono, sed ambaŭ ne estas ekvivalentaj. Tempo estas esenca propraĵo de homo. Neniu povas konsumi tempon de alia homo, ĝi estas nek aĉetebla nek vendebla. Atento devas esti direktata al tiuj kiuj dediĉas sian tempon al E-o."



Arkivo de UEA

LAMAS DÍAZ: Loka laboro

Pedro Pablo Lamas Díaz (71-jara) el la urbo Ciego de Ávila (Kubo), Honora Membro de UEA, ricevis la distingon Arnaldo Aguilar Couso pro sia longa laboro pri loka historio. La distingon aljuĝis la oficejo de la historiisto de la urbo kaj aliaj kulturaj instancoj regionaj.



EŬROPO: Troa sentemo

La 6-an de jun. Michel Barnier, ano de la Eŭropa Komisiono, partoprenis Interretan babilon pri la reformo de eŭropaj instancoj prepare al pilargiĝo de Eŭropa Unio. Al Miklós Gábor Nagy, laŭ kiu la lingva problemo povus bloki la laboron de EU-instancoj, Barnier respondis ke la temo ne estas en la tagordo, "verŝajne ĉar ankoraŭ regas tro granda sentemo pri la demando". Al Josette Ducloyer, menciinta la eblon enkonduki E-on lernejen, li replikis ke "elekti ne-vivantajn lingvon ne estus taŭga paŝo por proksimigi Eŭropon al ties civitanoj". Per sama vortumo li respondis al Renato Corsetti, kiu sondis pri la ebleco uzi la latinan kiel egaligan lingvon. (http://europa.eu.int/comm/chat/barnier1/barnier1_fr.pdf)

INTERRETO: Malpli da angla

La brita lingvisto David Graddol, konata i.a. pro sia libro *The Future Of English* ("La estonteco de la angla", 1997), diris intervjuate

de BBC: "Multaj angle parolantoj misperceptas la evoluon de Interreto": navigante nur tra angla lingvaj paĝoj, ili ne konscias la abundon kiu ekzistas en aliaj lingvoj. Li klarigis ke la proporcio (ne kvanto!) de anglalingvaĵoj en Interreto daŭre malkreskas, i.a. ĉar homoj uzadas ĝin pli kaj pli por lokaj celoj, en lokaj lingvoj.

EŬROPA JARO DE LINGVOJ

Konsilio de Eŭropo kaj Eŭropa Unio kundeklaris la jaron 2001 Eŭropa Jaro de Lingvoj, strebante progresigi la lingvo-instruadon kaj plikonsciigi la publikon pri la valoro de lingva plureco eŭropa. UEA subtenas la iniciaton, laŭn al la celoj de la E-movado kaj donontan okazon diskonigi niajn lingvopolitikajn celojn. La Jaro formale celas nur la lingvojn "rekonitajn de la membroŝtatoj", sed ja eblos ke E-organizaĵoj partoprenu per projektoj kongruaj kun la celoj de la Jaro. Por evoluigi ideojn pri la e-ista kontribuo al la Jaro, formiĝis grupo kunordigata de Anna Ritamäki (Dragsfjärds. 690, FI-25700 Kimito, Finnlando; ☎+358/2/423-146; ✉anna.ritamaki@kolumbus.fi).

Oficialaj informoj: <http://europa.eu.int/comm/education/languages/actions/year2001.html> (angle).

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondeblas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vidu en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

INVITAS AL Tutlanda Zamenhof-Festo (15-17 dec.) la e-istoj el Niŝ: kulturprogramo, dandkonkurso, urbestra akcepto. Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, YU-18000 Niŝ, Jugoslavio; ☎+381/18/322-609; ✉zcciric@eunet.yu.

LA 8-AN DE MAJO 2000 Märtha Andreasson mortis. La familio tutkore dankas por la kondolencoj kiuj venis de ŝiaj geamikoj de la tuta mondo. Elkore, Inge Andreasson, filino kaj filo.

KOMENCANTO — neordinare interesa internacia gazeto, pk 132, Ekaterinburg, 620041 Ruslando. Specimeno: 2 IRK.

LA PREZIDANTO DE LA AKADEMIO

de Esperanto komunikas al siaj kolegoj kaj al la e-ista publiko la tekston de la fakso kiun li ricevis de la Viceprezidanto Michel Duc Goninaz: "Opiniante, ke la labormaniero de la Estraro de la Akademio estas nekorekteble malnormala kaj konstatinte, ke mi ne povas en tiu estraro plenumi la intencojn, deklaratajn ĉe mia elekto kiel viceprezidanto en 1998, mi deklaras, ke mi ĉesis ofici kiel viceprezidanto kaj ke mi ne respondeblas pri la decidoj lastatempe faritaj nome

de la Estraro. La 13an de septembro 2000. Michel Duc Goninaz"

La Prezidanto bedaŭras lian decidon, sed ĝin respektas.

Geraldo Mattos, Prezidanto de la Akademio de Esperanto

UNIVERSITATO DE KOSTARIKO

malfermis, kadre de sia regula studprogramo, E-kurson (11 aŭg.-24 nov.), per kiu eblas akiri kreditunuojn. Instruas Hugo Mora Poltronieri. Por sproni la kursanojn, sendu bildkartojn al: Curso de Esp., Facultad de Letras, Universidad de Costa Rica, C. U. Rodrigo Facio, San José, Kostariko.

PRI LA ALVENO DE FILO IVAN

(10 okt.) ĝojas la gepatroj Ljiljana Bamburać kaj Nikola Rašić.



BULGARIO: lomete supren

Kiel konstatite en la 51-a kongreso de Bulgara E-Asocio (8-10 sep., Karlovo), BEA supreniras: lastjare la nombro de membroj kreskis de ĉ. 400 al 500; regulaj E-societoj de 32 al 43. *Bulgara E-isto* havas 200 abonantojn. Novaj honoraj membroj iĝis Kiril Velkov kaj Slavi Ivanov. Oni reelektis Petro Todorov por tri jaroj kiel prezidanton de BEA. Li formis el la 14 estraranoj laborskupon: vicprez. Bojidar Leonov, sek. Mariana Evlogieva, krome Grozdenka Filipova kaj Georgi Mihalkov, ĉefredaktoro de *Bulgara E-isto*. (M. Evlogieva).

• En la 18-a Somera E-Universitato (15-16 jul., Veliko Tarnovo) prelegis i.a. Georgi Mihalkov pri "Intima liriko en la E-literaturo", Lilia Sotirova pri "Poezia historio de la bulgara nacio", Radka Stojanova pri "Bulgaraj kutimoj kaj popolfestoj", Nikolaj Uzunov pri bibliaj profetaĵoj. Petko Arnaudov prezentis legaĵojn el la libro *Miru, pensu, ridu!* (1950) de Paul Bennemann. (P. Arnaudov)

FINNLANDO: Buller hejmurbe

Päätaalo-Instituto, trejnejo de amatoraj verkistoj en la norda komunumo Taivalkoski, festis sian 10-an datrevenon per seminario pri la pozicio de la finnaj lingvo kaj literaturo la 6-an kaj 7-an de julio. La enkondukan

prelegon, pri la pozicio de malgrandaj lingvoj en la mondo kaj ilia minacata ekzisto, faris la ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller, kiu, en sia tiama posteno de kultursekretario de Taivalkoski, estis kunfondinto de la instituto.

BRITIO: Ŝereo Barlastona

Tuj post la kutima somerlernejo (12-18 aŭg.), pli ol 30 esperantistoj el ses nacioj inaŭguris per ŝereo jubilean semajnfino, festante 40 sinsekvajn jarojn da somerlernejoj en Barlastono. En la semajnfino prelegis Marjorie Boulton (ĉi-dekstre) kaj John Wells, ambaŭ instruistaj dum la unua staĝo en 1960; krome Tim Carr, Renato Corsetti, Paul Gubbins, Anna Löwenstein, Eric McCanlis kaj William H. Simcock. UEA-volontulo Isacir Andreoni brile kontribuis al la somerlernejo, last-minute anstataŭante la tiam malsanan poeton Tim Carr. (P. Gubbins)



Facebook: Berthelot

KUBO: Festo Sankt-Spirita

La 12-an de aŭg. la e-istoj en la urbo Sancti Spiritus festis la 20-jariĝon de la loka E-komitato. (R. Castañeda Guerrero)

MEZ-EŬROPO: Konsultiĝo

Kiel pasintjare (vidu nov. '99, p. 200), okazis konsultiĝo de la landaj asocioj de Ĉeĥio, Hungario, Kroatio, Pollando, Slovakio kaj

Slovenio (Zagrebo, 15-17 sep.). Estis proponita fondo de UEA-komisiono pri Mezeŭropo, kun membroj Ján Vajs (Slovakio) kaj Stanisław Mandrak (Pollando) kaj prezidanto Oszkár Princz. La ĉeestintoj de la konsultiĝo pledis per rezolucio por enkonduko de Esperanto kiel samrajta lingvo ĉe interŝtataj rilatoj en Mezeŭropo. (S. Štítec)

NORVEGIO: En packonferenco

Bård Hekland prizorgis partoprenon de la konataj E-instruistoj Katalin Smidélus (Hungario) kaj Ron Glossop (Usono) en granda packonferenco maje en Tromsø. Ili prelegis pri la projekto Indigenaj Dialogoj resp. pri paseduko. (*Norvega Esperantisto*)

POLLANDO: Bjalistoka famo

Kiu ano de Bjalistoko plej famigis ĝin en la 20-a jc.? — demandis la tutlanda *Gazeta Wyborcza*, lokaj radio kaj televido. La plej populara montriĝis Zamenhof (6337 voĉoj), antaŭ komponisto Jerzy Maksymiuk (3433). Ankaŭ la 20-an lokon okupas e-isto, Jakub Szapiro (335). Vidu: <http://www.city.bialystok.pl/espera.htm>. (S. Mandrak)

• La sama *Gazeta Wyborcza* skribis duon-paĝe pri Esperanto lige al komenco de E-kurso de Georgo Handzlik en Bielsko-Biala.

• Laŭ propono de la loka filio de Pola E-Asocio, la urba konsilantaro de Gliwice nomis la 29-an de jun. du novajn stratojn "Antoni Grabowski" kaj "Odo Bujwid". Kun la stratoj L. Zamenhof kaj Esperantystów, Gliwice havas kvar stratnomojn E-rilatajn. Gratulu: Zarząd Miasta, str. Zwycięstwa 21, PL-44-100 Gliwice, Pollando; biuro_prasowe@um.gliwice.pl.

L'aste aperis

☞ (daŭrigo de p. 175)

Perbicikle tra Eŭropo. *Rememoroj pri la vojaĝo.* Dmitrij M. Cibulevskij (1946). Ĥarkiv: la aŭtoro, 2000. 64p. 21cm. Kun fotoj. Tri mil kilometroj tra Hungario, Slovenio, Italio kaj Kroatio, en 1992. € 4,20.

Sferoj 10. Sciencfikcio kaj fantasto. Kompilis Miguel Gutiérrez Adúriz. Santander: Grupo Nifo, 2000. 206p. ISBN 84 607 0788 1. 21cm. Ilus. Jubilea kolekto: 21 rakontoj de 15 aŭtoroj: Auld, Camacho, Montagut, Nemere k.a. € 12,00.

Strategio de Esperanto en la nova jarmilo. *La diskutkajeroj n-ro 4.* Gian Carlo Fighiera (1929). Rotterdam: UEA, 2000. 24p. 21cm. Pri la celoj de la agado per kaj por E-o, pri la problemaro "komunumo/movado", la rolo de UEA kaj kritikoj pri ĝi. € 2,25. Triona rabato ekde tri ekz.

Strukturo kaj kvalitoj de alojoj surbaze de sistemoj de nemiksiĝantaj komponan-

toj. A. D. Ŝljapin. Moskvo: la aŭtoro, 2000. 34p. 21cm. € 3,00.

Sveda floraro. Sten Johansson (1950). Norrköping: Al-fab-et-o, 2000 (2-a eld.). 63p. ISBN 91 89432 00 2. 21cm. Svedaj, latinaj kaj Esperantaj nomoj de 840 plantoj. € 5,40.

Ŝaŭmo de l' tagoj, La (2) (1947). Boris Vian (1920-59). El la franca trad. Claude Longue-Épée. Paris: UFE, 2000. 71p. 21cm. "La plej korŝira el ĉiuj nuntempaj amromanoj" (R. Queneau), kvazaŭ Schwartz-e lingvoluda fabelo moderna. Dua parto. € 6,00.

Taglibro de la reveno el mia deportiteco. 8 ĝis 24 majo 1945. Juliano Ducrocq (1922). Sablé-sur-Sarthe: la aŭtoro, 1995. 15p. 21cm. Verkita laŭ milittempaj notoj. € 3,00.

Vergilio, la patro de Okcidento. *Kultur-filozofia eseo pri Eŭropo kaj ĝia spirito* (1931). Theodor Haecker (1879-1945). El la germana trad. Vinko Ošlak. Klaŭdiforumo: Hermagoras/Mohorjeva, 2000. 109p. ISBN 3 85013 766 X. 21cm. Verko de malprave neglektata germana filozofo. € 12,00.

Vesper-mesaĝoj. Zoran Ćirić (1970).

Varna: Bambu, 2000. 68p. ISBN 954 9637 06 9. 20cm. Personaj spertoj de junulo el Jugoslavio dum la milito en marto-junio 1999, rete mesaĝitaj. Apendice: kronologio kaj oficialaj tekstoj. € 6,00.

Vivo gaja kaj malgaja... sed interesa! *Rakontoj.* Nina Korĵenevskaja (1949). Moskvo: Eŭropa Jura Universitato Justo, 1999. 74p. 20cm. Propravivaj spertoj el Ruslando, Francio kaj dum vojaĝoj. € 6,00.

KOMPAKTAJ DISKOJ

Ho! Mia kor'! Merlin. Tekstoj kaj muziko: Markone Froes. Brazilia: Brazila E-Ligo, 2000. 38 min. Kun komputila aldonajo teksta kaj foto. Kantoj diversstilaj, ĉerpantaj el la vasta gamo de brazila muziko, de sambo ĝis poproko. € 12,60.

Ni dancu en la rondo. *Brazilaj infanaj kanzonoj.* Kantas Flávio Fonseca kaj Cristina Pancieri. Muzikaranĝoj kaj direktado de Flávio Fonseca. El la portugala trad. Jorge Teles. Brazilia: Brazila E-Ligo, 2000. 31 min. € 12,60.

Ivon BARBOSA (1927-2000), delegito pri aeronautiko, parapsikologio kaj joko en Baurú (Brazilo), forpasis la 1-an de julio.

Jean BOMFORD (1933-2000), artistino, mortis la 25-an de julio en Newlyn (Kornvalo, Britio). Fidela esperantistino, ŝi kreis "elstare unikajn, signiforiĉajn bildojn" (Marjorie Boulton) por multaj libroj Esperantaj, i.a. por la Auld-a versio de *La robatoj* de Kajam, *Merlo sur menhiro* (A. Goodheir), *Du el* (M. Boulton/ P. Thorsen) kaj *Pretertempe* (A. de Giorgi).

Audino CASTELO BRANCO (1961-2000), antaŭe delegito pri homaranismo kaj edukado en San-Paŭlo (Brazilo), iama estrarano de la urba Esperanto-asocio, forpasis antaŭ nelonge.



Arkivo de UEA

Regina EMSON (1908-2000), estonino edziniginta al sveda e-isto en la 30-aj jaroj, delegito en Borås (Svedio) dum preskaŭ duona jarcento, forpasis la 26-an de majo.



El Lelekono de aktivaj jugoslavaj e-istoj

Milan MARKOVIĆ (1932-2000) mortis la 24-an de aprilo en Beogrado, kie li estis delegito. Li agis kiel sekretario de Jugoslavia Esperanto-Instituto, gvidis multajn diversnivelaĵajn kursojn de E-o, kaj funkciis kiel LKK-sekretario de la 58-a UK (Beogrado, 1973).

Jean-Paul COLNOT (1928-2000), delegito kaj fakdelegito (pri junularo, poste turismo) preskaŭ duonan jarcenton en Nancy kaj Laxou (Francio), mortis en aŭgusto.

Raymond COUDERT, antaŭe delegito en Brioude (Francio), forpasis 86-jara.

Miklós FEHÉR (1921-2000), tradukisto kaj redaktoro, mortis la 7-an de aŭgusto en Budapeŝto. El pli ol 1500 paĝoj de liaj poeziaj tradukoj (el la hungara kaj pli ol dekduo da aliaj lingvoj) nur parto aperis, i.a. en *Hungara Vivo*, *La KancerKliniko* kaj en *Eŭropa Poezio en Esperanto* (1995-), kiun li mem redaktis. (En TTT: <http://www.esperanto.hu/libroj/toldi.htm>.)

Adele JONAS, longtempa membro de Aŭstria E-ista Federacio, fratino de la e-ista ŝtatprezidanto Franz Jonas (1899-1974), forpasis 92-jara, la 24-an de julio.

Inga MAGNUSSON (1917-2000), dumviva membro, antaŭe fakdelegito pri virinaj aferoj, forpasis la 19-an de aprilo en Helsingborg (Svedio), kies E-klubon ŝi prezidis dum 30 jaroj (1966-96).

José MARTÍNEZ PUCHE mortis 95-jara la 31-an de aŭgusto en Bonaero. Lerninte E-on en Katalunio, li elmigris al Argentino en la 30-aj jaroj, kaj li multe helpis enmigrintojn el Hispanio post ties inter-civitana milito. E-instruisto, li aktivis same en UEA kiel en SAT.

Christine PEARSON (1919-2000), dumviva membro, iama delegito en Frodsham (Britio) kaj fakdelegito pri ornitologio, forpasis antaŭ nelonge.

J. L. (Tini) PUTTO (1907-2000) mortis en Lochem (Nederlando) la 18-an de majo. Ŝi estis sekretario (1959-81) de Kristana E-ista Ligo Internacia, UEA-membro ekde 1939, delegito kaj fakdelegito pri evangelia kristanismo 30 jarojn.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

fariĝu patrono de TEJO

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- TEJO tutmonde (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikajojn.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ☐ kependerb@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ☐ corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ☐ mc8750@mlink.it.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobříčovice, Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ☐ chrdle@telecom.cz.


Estrarano (Afrika agado, sporto): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17; ☐ esp.togo@cafe.tg.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ☐ kalle@esperanto.se.

Estrarano (kulturo, landa agado): s-ro Tacuo Huĝimoto, Kubota 31, Sakio-ku, Kyōto, 606-8266, Japanio; ☎/✉ +81-75-711-45-58; ☐ jasu-k@mac.email.ne.jp.

Observanto de TEJO: d-ro Sjoerd G. Bosga, Trådragargatan 27 D, SE-72337 Västerås, Svedio; ☎ +46/21/417-045; ☐ sjoerd@esperanto.se.

Observanto de ILEI: s-ro Stefan MacGill, Bethlen G. u. 2, HU-2030 Erd, Hungario; ☎ +36/23/364-198; ☐ Stefan.MacGill@galamb.net.



ĈU NI SERĈAS VIN?

Multaj esperantistoj membriĝus en UEA, se iu proponus al ili tion kaj ricevus ilian kotizpagon.

Tial UEA densigos la reton de kotizperantoj.

Skribu al la Direktoro de la CO, se ĝuste vi estas unu el la iniciatemuloj, kiujn ni serĉas!

UEA

Nieuwe Binnenweg 176

3015 BJ Rotterdam, Nederlando

☎ +31 10 4361751 ☐ uea@inter.nl.net

Eltendu el via Jarlibro la lastan paĝon




**10%
RABATO!**

kaj sendu ĝin al la Libroservo de UEA!
Ĝi ja estas kupono, kiu rajtigas vin
ĝis la 31-a de dec. 2000 mendi kion
ajn kaj kiom ajn kun 10%-a rabato!

POR LERNI KAJ ARGUMENTI

Ĉu la lingvopolitiko de internaciaj organizadoj utilas nur por simbolaj politikaj celoj? Ĉu aktualaj modeloj de plurlingva demokratio efektive diskriminacias? Kian rolon ludu lokaj lingvoj en la solvado de mondaj problemoj? Kion eblas lerni el la spertoj pri Esperanto? Ĉiu kontribuajo en la originala lingvo (angla, franca aŭ Esperanto), kun resumo en ĉiuj tri lingvoj. La angla teksto de la pionira raporto "Esperanto kaj la lingva demando ĉe Ligo de Nacioj" de NITIBE Inazō estas unuafoje publikigita ĉi-libre.



AL LINGVA DEMOKRATIO / TOWARDS LINGUISTIC DEMOCRACY / VERS LA DÉMOCRATIE LINGUISTIQUE. Aktoj de la Nitobe-Simpomio, Prago, 1996. Mark Fettes kaj Suzanne Bolduc (red.). Rotterdam: UEA, 1998. 212p. ISBN 92 9017 054 9. 24cm. Prezo: €10,20.

NE NUR NUDELOJN!



KRAFT
estas marko de Philip Morris, la plej granda transnacia fabrikanto de cigaredoj sub la marko **MARLBORO**. Tiu kompaniego multlande kaj intense instigas gejunulojn al tabak-uzado.

Ĉesigu la tabak-komercon ĉe infanoj!

**Evitu la produktojn
KRAFT!**

Pliaj informoj (anglalingve): www.infact.org

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and
Documentation of World Language Problems

La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.

Redaktas: Humphrey Tonkin,
Frank Nuessel, Mark Fettes.

Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.

Individua abono: 50,80 eŭroj

Institucia abono: 97,10 eŭroj


Abonu pere de la Libroservo de UEA.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KŬITAKTO

estas gazeto
por ĉiu kiu serĉas interesan
legaĵon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
KŬITAKTO estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 2000 **KŬITAKTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 2000

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	39,67 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	36 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	740 frankoj	Hispanio	2600 pesetoj	Pollando	9 eŭroj
Brazilo	9 eŭroj	Israelo	14 eŭroj	Portugalia	2900 eskudoj
Britio	13 eŭroj	Italio	36000 liroj	Svedio	165 kronoj
Danio	135 kronoj	Japanio	2300 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	110 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	20 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

UNIKE VASTA PANORAMO



Unike vasta panoramo al la dilemoj de la nuntempa mondo. Aperigante tiujn ĉi referaĵojn en Esperanto UEA demonstris sian ligitecon al la streboj de Unesko pri kulturo kaj prezentis al E-parolantoj legaĵojn kiuj helpas meti la strebojn kaj celaron de la E-movado en pli vastan kuntekston. (Vilmos Benczik, *Esperanto* 1999:12)

KULTURO KAJ EVOLUO. Mervyn Claxton. Trad. Johano Rapley. 1998. 60p. ISN 92 9017 59 X. 21cm. € 6,90.

KULTURO KAJ TEKNOLOGIO. Andrew O. Urevbu. Trad. Johano Rapley. 1997. 63p. ISBN 92 9017 053 0. 21cm. € 6,90.

KULTURO KAJ SANO. Mervyn Claxton. Trad. Helga Rapley. 1999. 42p. ISBN 92 9017 060 3. 21cm. € 5,40.

Triona rabato por samtempa aĉeto de ĉiuj tri libretoj aŭ de 3 ekz. de sama libreto. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

POR FACILE TROVI ALIAN VORTON

ESPERANTAJ SINONIMOJ. Jaan Ojalo (1914). Rotterdam: UEA, 1999 (3-a, korektita eld.). 96p. Prezo: € 7,20.

Ofte oni sentas la bezonon vigligi kaj variigi sian stilon per uzo de sinonimoj aŭ de preskaŭ-sinonimoj. Por helpi en tio, la estona aŭtoro kompilis tiun ĉi vortaron. Bazita sur PIV, ĝi enhavas 1925 kapvortojn kaj 5500-vortan indekson. Taŭga fonto por ĉiu kiu volas pliriĉigi sian vortostokon.



Rikolto de 50 jaroj

"La jaro 1997 signas la 50-jariĝon de mia serioza verkado en Esperanto. La ĉefa rikolto de tiu verkado estas la kvindek de miaj libroj (ankoraŭ plimultiĝonta) sur breto en mia biblioteko. Sed post ĉiu rikoltado postrestas surkampe pajleroj kaj stoploj, kiujn oni kutime forbalaas aŭ surtretas. — Mi do decidis kolekti libroforme tekstojn miajn, kiuj ŝajne havas valoron pli ol nur efemeran, kaj jen la rezulto. Ekzemple, dum mia vivo mi verkis versajne centojn da librorcenzoj; la plimultaj estas sufiĉe rutinaj, sed de tempo al tempo mi pliprofundigis en la koncerna afero, kaj la rezultinta recenzo eble kontribuas al nia literatur-esplora laboro. Tiajn do mi decidis 'savi'." (William Auld)



**La libro estas aranĝita en kvar sekcioj:
Eseoj, Rakontoj, Tradukoj, Libro-kulturo.
Tre bela grafika prezento.**

PAJLEROJ KAJ STOPLOJ. Elektitaj prozaĵoj. William Auld. Rotterdam: UEA, 1997. 348p. ISBN 92 9017 052 2. 21cm. Prezo: € 19,05.

LEGOLIBRO EL KANADO

LITO APUD LA FENESTRO.
Betty Salt (1907-1994).
Rotterdam: UEA, 1999. 111p.
Prezo: € 4,80.

Simplaj rakontoj, teatraĵetoj kaj poemoj, kun kelkaj tradukoj el la kanada literaturo. Stile belaj, ili facile kaptas ankaŭ la malpli spertan leganton, dank' al relative facila lingvaĵo. Ankaŭ pro la mallongeco de la plej multaj tekstoj la libro bone taŭgas kiel progresiga legaĵo.

